

# ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



Grandeco ensorcita en lignon (vd. p. 98)

N-ro 631 (6)  
Junio 1958

Universala  
Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun  
U. N. E. S. C. O.)

# esperanto

JUNIO 1958

51 a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 631 (6)

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

**Cion por la redakcio** oni sendu al la Redaktoro:  
MAG. W. AULD, Knockfarril, Thornsidge Road, Johnstone,  
Renfrewshire, Skotlando.

**Cion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (bonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Girkonto: 378964. Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

**Bankisto de U.E.A.:**

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

**Senduko kaj represo** de artikoloj estas permesataj, sed oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

**Jara abono (1958):** 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

**Tarifo por reklamoj:**

1 paĝo 128,— gld  $\frac{1}{2}$  paĝo 64,— gld  $\frac{1}{4}$  paĝo 32,— gld  $\frac{1}{8}$  paĝo 16,— gld  $\frac{1}{16}$  paĝo 8,— gld

**Anoncetoj pri korespondado:**

10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu

**Legantoj en 40 landoj.**

**Estraro de U.E.A.:**

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,  
Telefono: ARNold 90-81.

## Enhavo

Unu fojon en cent jaroj . . . . .	93
La ŝlosilo estas en viaj manoj . . . . .	93
Esperanto en la scienco. G. F. Makkink . . . . .	94
Diskuto pri Esperanto. S. Szathmári . . . . .	95
Panglottia de Comenius. Miškovská (Cíhová) . . . . .	96
Internacia lingvo por infanoj . . . . .	100

## Rubrikoj

CED . . . . .	97
Monda galerio . . . . .	98
Tra la mondo . . . . .	102
Librosugesto de la monato . . . . .	104
Ŝaka rubriko . . . . .	104
43a U.K. . . . .	105
Koresponda servo mondskala . . . . .	105
Radio . . . . .	105
Radio-babiloj . . . . .	106
La internaciaj konkursoj . . . . .	106
Novaj libroj . . . . .	107
La lingva haoso . . . . .	109
Esperantista vivo & Nekrologo . . . . .	109
La Juna Vivo . . . . .	110
Oficiala informilo . . . . .	112

Manuskriptoj por „Esperanto“ devas esti klare tajpitaj sur unu flanko de la folioj, kun interlinia spaco, en perfekta Esperanto kaj en du ekzempleroj. Neuzotajn manuskriptojn oni resendadas nur kontraŭ afranko aŭ respondkuponon.

**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O)

# UNU FOJON EN CENT JAROJ

## Unu Milonon de la jara Enspezo!

La preparlaboroj por la grandaj festoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof bone progresas laŭ la provizora plano, publikigita en la januara numero de la revuo "Esperanto". Estas jam formita *Internacia Organiza Komitato (IOK)* en kiun eniris elstaraj kaj konataj esperantistoj de diversaj landoj.

Post la publikigo de la provizora plano alvenis ankaŭ tre granda nombro da pliaj proponoj, sugestoj, konsiloj. Ilia nombro estas tiel granda, ke estas maleble respondi al ĉiu unuope. La proponoj estas atente studataj kaj tute certe ĉio utila kaj realigebla estos efektivigita.

En ligo kun tiu inundo de proponoj kaj sugestoj estas utile atentigi, ke ne sufiĉas nur fari proponon, sed necesas ankaŭ indiki kiu plenumos ĝin kaj per kiuj rimedoj, precipe kiam temas pri "grandiozaj" proponoj, kies realigo kostus milojn da pundoj!

Malpli abunde ol la proponoj kaj sugestoj — multe malpli — alvenis kontribuoj por la *Fondaĵo-Zamenhof*. Kelkaj sindonaj esperantistoj — ĉefe tiuj, kiuj kutime kontribuas por ĉiu utila kampanjo — jam sendis sian financon helpon. Dank' al ili kolektiĝis ĝis nun la sumo de 1.612,01 nederlandaj guldenoj. Espereble, en la momento, kiam tiuj ĉi linioj estos legataj, la *Fondaĵo* estos konsiderinde pli granda. Tamen, se la kontribuoj alvenados ankaŭ en la estonteco same malrapide, kiel ĝis nun, malmulto el la provizora plano estos realigebla, eĉ por ne paroli pri la novaj proponoj, alvenintaj de diversaj flankoj. Kvankam novaj ideoj estas tre bonvenaj, tamen da ideoj ni havas sufiĉe, sed da financaj rimedoj tro malmulte! Sekve, en la nuna momento estas necese unuavice krei imponan *Fondaĵon-Zamenhof*.

Ĉiu esperantisto en la mondo, eĉ tiu kun la plej modestaj enspezoj, devus kontribui almenaŭ ion al la *Fondaĵo-Zamenhof*, kiu prezentas la materian bazon de la festoj. Ne estas necesaj grandaj sumoj — kvankam la pli bonstataj esperantistoj certe povos fari pli grandan oferon — sed estas necese, ke absolute ĉiuj kontribuu por tiu celo. La vorto "impосто" estas iom malsimpatia en ĉiuj landoj. Eble la vortoj "libervola imposto" sonas pli alloge. Ĉu ĉiu esperantisto kaj esperantistino ne povus unu fojon en cent jaroj oferi unu milonon (ne milionon, sed milonon) de sia jara enspezo kiel sian kontribuon, minimuman, al la *Fondaĵo-Zamenhof*? Mi estas certa, ke ne ekzistas tiel malriĉa persono, kiu ne povus fari tiun oferon. Se la leganto aŭ legantino konsentas, li aŭ ŝi agu jene:

1. Tuj mem kontribuu unu milonon de sia jara enspezo al la *Fondaĵo-Zamenhof*;
2. informu la lokan grupon kaj siajn geamikojn pri la Jubilea Jaro kaj tuj kolektu donacojn por la *Fondaĵo-Zamenhof* laŭ la prezentita principo;
3. la kolektitajn sumojn oni bonvolu sendi aŭ rekte al la *Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C.*, aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj de U.E.A. en diversaj landoj kun klara mencio "Por la *Fondaĵo-Zamenhof*".

La nomoj de ĉiuj kontribuintoj aperos en la revuo. La utiligo de la *Fondaĵo-Zamenhof* estos farita laŭ la decidoj de la IOK. Ĉiuj elspezoj kaj enspezoj estos kontrolitaj laŭ la Statuto de U.E.A.

Ne atendu la morgaŭan tagon, sed ekagu tuj. Ne transjetu la laboron sur la aliajn, sed faru mem vian eblon. Konsciuj, ke vi ne estas izolitaj, sed ke multaj samcelanoj agas sammaniere en la tuta mondo. Helpu jam nun, ke la festoj en la Jubilea Jaro estu vere imponaj kaj dignaj de la grandeco de la verko de D-ro Zamenhof!

**D-ro Ivo Lapenna,**  
Provizora sekretario de la IOK

## La ŝlosilo estas en viaj manoj

La nuntempuloj ĵetas la rigardojn malantaŭen kaj ekzamenas la diversajn vojojn de la evoluo, provante trovi la kaŭzajn rilatojn, kiuj kondukis al tio, kio hodiaŭ ĉirkaŭas nin.

Sur la akirita scio kaj sperto pri la estinteco ni konstruas kaj projektas.

La hinda filozofo kaj verkisto Rabindranath Tagore donis la jenan konsilon: Esploru la pasintecon, agu en la nuno, laboru por la estonteco. Tiuj tri reguloj estas saĝaj, ĉar ili esprimas la kvintan esencon de la evoluo kaj montras al la signifo de la individuo.

Ofte ni hezitas antaŭ la maln-facile solveblaj demandoj, kiuj ni renkontas sur la vivovojo. Ni sentas nin malgrandaj, ni kredas, ke la batalo estas tro giganta kompare kun nia kapablo. Sed ni memoru, ke estas pli bone la sonon de rompiĝanta kordo ol neniam pretigi la sagoarkon.

Ni esperantistoj estas anoj de ideo, kies realigo signifas revolucion sur la lingva kampo. Nia tasko estas rompi tradicion, kies radikoj penetras tra jarmiloj, kiu estas ĉirkaŭata de la fortikaĵoj de antaŭjuĝoj kaj superstiĉaj vidpunktoj rilate al la lingva artefarita lingvoj, kiu pro la plej diversaj motivoj estas fanatike defendata de kategorioj, kiuj estas potencaj kaj monhavaj.

Tiu fakta konstato povas elvoki rezignon, lamigi nian konvinkon kaj facile transformi nian entuziasman optimismon en pesimismon, se ni nur rigardas la malhelpaĵojn kaj forgesas la gravan fakton, ke la ŝlosilo de la estonteco la homo de la nuno havas en la manoj. Estas la nunvivantoj, kiuj per siaj agoj formas la morgaŭon.

Neniu ero de la evoluo estas kreata sen peno, kaj la vojo al la venko iras tra malsukcesoj kaj malvenkoj "per laboro de la esperantoj", eĉ se ilia nombro estas malgranda, ilia forto malestimata kaj ilia idealo primokata.

EINAR DAHL

# ESPERANTO EN LA SCIENCO

Oni povas tezi ke, se Esperanto estos enkondukata en la sciencan, tio estos farata de la sciencistoj kaj ne de la kamparanoj, laboristoj, diplomatoj ktp. Oni povas ankaŭ tezi ke, se Esperanto estos uzata en la scienco, tio estos farata de la sciencistaj Esperantistoj, kaj nek de neesperantistoj, nek de nesciencistoj. Do, se la grupo de esperantistaj sciencistoj preterlasas apliki Esperanton en sia scienca verkado, Esperanto ne kaj neniam estos uzata en la scienco. Ĉu la esperantistaj sciencistoj konscias pri sia devo kaj efektive publikigas en Esperanto?

Bedaŭrinde nur tre malmultaj faras tion kaj ili faras tion malofte. Kial? Ili havas diversajn kialojn: fakrevuoj ne akceptas esperante verkitajn kontribuojn, la legantaroj ne kapablas legi la verkaĵojn, oni volas atendi ĝis la aplikado de Esperanto estas ĝenerale interkonsentita, oni timas ke la scienca instanco en kies servo la esploro estas farita ne permesos uzi Esperanton, ktp. Kelkaj de tiuj kialoj efektive validas, kelkaj estas nur ŝajntialoj. Ĉiukaze ni povas konkludi ke, se ne ekzistas grava premo de la flanko de la esperantistaj sciencistoj, nek la redakcioj de sciencaj revuoj, nek ĝiaj legantaroj, nek la direktistoj de sciencaj institucioj cedos al Esperanto.

Pro tiaj konsideroj mi komencis verki sciencajn artikolojn tute en Esperanto post kiam mi ofte publikigis en la angla aŭ en la nederlanda lingvoj, kun aŭ sen Esperanta resumo. Kaj mi sukcesis koncerne la presigon de la artikolo. Ankoraŭ mankas la informoj por respondi la demandon ĉu oni legis ĝin.

Por instigi kolegojn kaj helpi ilin per taŭgaj konsiloj, mi volas raporti kiel mi atingis la rezulton. Temas pri artikolo de 16 presitaj paĝoj kun la titolo "Ekzameno de la formulo de Penman"; ĝi traktas la elvaporigon de akvo el greskovritaj ebenaĵoj. Mi prezentis la kontribuojn al "Netherlands Journal of Agricultural Science", kvaronjara periodaĵo de pr. 320 paĝojn jare, redaktita en la angla.

Mi metis anglajn klarigojn ĉe la tabelojn kaj figurojn aldona al la esperantaj kaj aldonis anglan resumon kiel estas la kutimo se ne-angla lingvo estas uzata. Plue mi aldonis piednoton en la angla de jena enhavo: "La aŭtoro komunikas ke li verkis sian artikolon en Esperanto ĉar: 1) Esperanto estas multe pli taŭga por neanglaj uzantoj ol la angla lingvo, 2) verkado en Esperanto igas aŭtoron sendepende de tradukisto aŭ angla korektisto, 3) Esperanto povas esti legata kun tre malmulte da peno kaj kun la nura helpo de simpla gramatiko kaj vortaro, 4) Esperanto ebligas solvi la ĥaosan lingvan situacion en la scienco laŭ efika maniero".

Por plene informi la redakcion pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto mi kune alsendis

artikolon de 12 tajpitaj paĝoj en la angla (kontrolita de angla Esperantisto) titolita "La efikeco de la komunikado en la scienco". Mi rajtigis la redakcion presi ĝin kune kun la faka artikolo, se ĝi dezirus respondi sin antaŭ la legantaro en kazo de akcepto de la Esperanta kontribuajo.

Ĉar estis la unua fojo ke Esperanta artikolo estas prezentita al la revuo, la plena redakta komitato de 8 personoj kaj 1 asesoro devis decidi. Tial mi sendis antaŭ la redakta kunveno al ĉiu membro kopion de la angla artikolo pri la lingvo-problemo kaj unu paĝon de la Esperanta artikolo. Plue mi persone vizitis 6 el la 9 personoj. Feliĉe mi bone konis la sekretarion de la redakcio, ĉar li estas saminstitutano. Hazarde lia patro estas Esperantisto. Li do pretis subteni mian proponon. Al la aliaj vizititoj mi ankaŭ petis subtenon. Tri el ili promesis: unu ĉar li tro bone konas la malfacilaĵojn kun la angla kiel redaktoro de alia internacia fakrevuo; la dua ĉar li ŝatas fari la eksperimenton, kvankam li dubas la sencon, la tria ĉar li povas konsenti kun mia rezonado. Unu alia komitatano kun kiu mi havas bonajn rilatojn kontraŭas al farita lingvo. Fine unu ne refutis mian detalan klarigon, sed verŝajne ne estis tute konvinkita. Bedaŭrinde mi ne havis la okazon paroli kun la prezidanto, kiun mi bone konas. Mi konjektis lin kontraŭ, sed evidentiĝis ke li ne kontraŭis kaj proponis akcepti kaj anstataŭigi mian piednoton per alia de la redakta komitato. Ĝia traduko estas: "Noto de la redakta komitato: La celo de "Netherlands Journal of Agricultural Science" estas prezenti la rezultojn de nederlandaj agrikulturaj esploristoj sub la atenton de legantaro kiom eble plej vasta, publikigante artikolojn en internacia lingvo. Esperanto estas internacia, tial la redakta komitato ne rifuzis akcepti artikolon en tiu ĉi lingvo."

Oni povas demandi al kio la sukceso devas esti atribuita: al la hazardo de la konsisto de la redakta komitato, al la premo de mia argumentado en la artikolo pri la lingvo-problemo aŭ al mia reputacio de sciencisto al kiu mankas strangeco kaj fanatikemo. Verŝajne ĉiuj kaŭzoj kunagis. La hazardon oni ne povas influi, nur maksimume eluzi. La argumentadon oni povas efikigi, cedante pri vulgara propagando. Kaj koncerne la personon: nur tiuj kiuj ĝuas bonvolemon sekvu la ekzemplon.

Pri la prilingva artikolo mi nur volas diri, ke mi nur enmetis aferecajn argumentojn kiuj estas science akcepteblaj. Grava en ĝi estas modesta taksado de la efikeco de la apliko de Esperanto en la scienco kompare kun la angla. Mi pruvigis ke la facileco de lingvo estas pli decida ol ĝia disvastigo. Pro tio Esperanto estos almenaŭ 2,5 ĝis 3 foje pli efika en la uzado ol la angla.

Post la akcepto de la artikolo ankoraŭ sin prezentis malfacilaĵo kiu meritas specialan atenton. La presisto ne posedis supersignitajn literojn de la tipo uzita por la revuo, nek la esperantistaj presejoj en Nederlando. La redaktoro do devis permesi ke la artikolo estu presata per similaspekta tipo de kiu supersignitaj literoj jes estas disponeblaj. Tiujn literojn havis la presisto de "Esperanto" kaj li presis la artikolon. Tamen la entiro de tiu presejo kaŭzis komplikajn kaj perdon de tempo, ĉar nun la presprovaĵoj devis pasi du anstataŭ unu presiston. Krome tiu presisto ne posedis supersignitajn malgrandajn majusklojn de ia mezuro uzata por la klarigoj de figuroj kaj tabeloj. Mi do devis elekti inter du malbonoj: akcepto de tro granda literspeco aŭ akcepto de foresto de kelkaj supersignoj. Pro estetikaj motivoj mi elektis la duan alternativon. Kun malfruiĝo de tri semajnoj la revuo aperis.

Mi konkludas ke estas dezirinde ke en ĉiu lando Esperantista instanco per enketo inter presistoj de Esperantaĵoj kolektu la necesajn informojn pri la ĉeesto de supersignitaj literoj (mezuroj, specoj (minuskloj, majuskloj, kursivoj ktp) kaj tipoj (Garamont, Bodoni, Romulus ktp). Per tiuj informoj oni povos trovi sen tempoperdo la taŭgan presejon por komposti tekston por ia scienca revuo. Tiuj informoj fortigos nian pozicion koncerne la presadon en neesperantaj revuoj.

Hidrologoj kiuj havas fakan interesigon pri la menciita temo povas peti represajon al Instituto por biologia kaj kemia Esploro de Agrikulturaj Kreskaĵoj, Bornesteeg 65, Wageningen. Ili uzu oficialan leterpaperon. Kolektantoj ne ĝenu min. Interesiĝuloj pri la angla artikolo pri la lingvo-problemo petu ekzempleron kun aldono de internacia korespondkupono ĉe mia adreso Eekhoornlaan 10, Bennekom.

Kial mi petis spacon de "Esperanto" por tiu ĉi artikolo, kvankam la sciencistoj verŝajne ne estas tre nombraj inter la legantaro? La respondo estas: mi apelacias al la helpemo de la certe nombraj nesciencistoj, por ke ili instigu per la artikolo siajn sciencistajn konatulojn al esperanta verkado.

G. F. MAKKINK

**Sándor Szathmári:**

## *Diskuto pri Esperanto*

Mi renkontiĝis sur la strato kun mia konatulo.

— Nu, kien vi iras? — li demandis post la reciprokaj salutoj.

— Al la esperantistoj.

— Kaj kial? — li demandis surpriziĝe.

— Ĉar mi estas esperantisto.

Ekterurite li ekhaltis: — *Esperantisto?* — li demandis kun grandaj okuloj, ĉar li altestimis min

kaj neniam li povus supozi pri mi tian frenezajon.

— Jes — mi respondis per indiferenta tono.

Eĉ lia spirado haltis kaj dum momentoj li ne povis ekparoli. Sed li — kiel mi jam menciis, — altestimis min kaj ne volis min ofendi. Precipe li interesiĝis, per kiuspecaj simptomoj manifestiĝas ĉe mi tiu... tiu... eco.

— Nu, mi respondis, — mi vizitadas la kunvenojn, leterŝanĝas, legas, verkas, do sume: mi agitadas por Esperanto.

Li apenaŭ povis rekonsciiĝi, sed fine li demandis per balbuta voĉo:

— Sed... tiun lingvon parolas nur malmultaj homoj, kial vi tamen agitadas por ĝi?

— Kial? Ĉu ne vi mem diris, ke Esperanton parolas nur malmultaj homoj?

— Nu jes... sed ĝuste pro tio...

— Vi tute pravas. Ĝuste pro tio! Se la lingvon parolus jam ĉiu homo, mia agitado jam estus superflua.

Kapbalancante li enpenisiĝis. Post kelkaj momentoj li ekparolis:

— Kaj kiel la diverslingvanoj povas kompreni unu la alian esperantlingve?

— Tute kiel vi mem diris: esperantlingve. Diverslingve ili ne komprenus unu la alian.

— Vi ne komprenis min.

— Kvankam ni estas samlingvanoj.

— Ne konfuzu miajn vortojn. Ekzemple la vorton "kolonelo" la angloj prononcas "kernel", la francoj "kolonel", la italoj "Kollonello". Kiel la esperantistoj povas kompreni la diversajn dialektojn?

— Vi tute pravus, se la anglaj esperantistoj dirus "kernel", la francoj "kolonel", la germanoj "oberst", la rusoj "palkovnjik". Tio fakte kaŭzas ioman konfuzon, sed la Esperanta lingvo havas propran nomon por tio: "kolonelo" kaj ĉiu lernas la saman en la tuta mondo.

— Kaj ĉu ne estas diferenco en la prononcoj?

— Kelkfoje okazas, ke iu ĉino ne povas ĝuste prononci la literon "r" kaj anstataŭe diras "l", aŭ la francoj "h", sed neniam okazas tiel gravaj diferencoj kiel ekzistas inter la dialektoj de la sama nacia lingvo kaj kiujn tamen bone komprenas la samnacionoj.

— Mi tamen ne povas imagi, ke diversnaciaj esperantistoj povus kompreni unu la alian.

— Ĉu vi jam provis paroli Esperante kun alinaciono?

— Kiel vi imagas? Mi ne konas la lingvon!

— Kara amiko! ni supozu, ke mi asertus al vi, ke per integralo oni ne povas elkalkuli la surfakon de la globo kaj poste evidentiĝus, ke mi absolute ne konas la matematikon. Kiel vi opinius pri mia aŭdaca laikeco?

— Sed tiu lingvo ne havas animon.

— Ĉu la pontoj havas animon? Tamen ili kunligas la bordojn. Sed kion vi volas signifi per la vorto "animo"?

— La literaturan uzeblecon. Esperanto ne estas oportuna por literaturo.

— Ĉu vi jam legis Esperantan literaturajn?

— Mi ripetas: mi ne konas la lingvon.

— Tamen vi opiniadas.

— Ĉar multaj homoj diras la samon.

— Jes, mi scias: Esperanto estas la sola scienca teritorio, en kiu la laikaj fakopinioj estas ĝenerala kutimo.

— Kaj ĉu la uzado de Esperanto en literaturo ne kaŭzas malaltigon de la nivelo?

— Kara amiko, diru al mi: kiaspecaj poemoj estas pli altnivelaj — ĉu la krajone skribitaj aŭ la inke skribitaj?

— Kia demando! la nivelo ne dependas de la skribilo.

— Nu, la lingvo estas ankaŭ ilo. Kiam Zamenhof skribis siajn pensojn esperantlingve, tio havis nivelon. Se vi skribus viajn pensojn, tio ne havus nivelon.

— Ne tro ĝentila respondo, sed ne gravas. Ĉu vi rimarkis ankoraŭ, ke preskaŭ neniu registaro favoras Esperanton? Kelkaj rekte persekutas ĝin, la ceteraj kondukas maksimume indiferece, sed neniu ĝin enkondukis en la lernejojn?

— Tio estas tute komprenebla. Mi primiras nur la toleremon de tiuj registaroj, kiuj malamas nian movadon, ke ili ankoraŭ ne krucumis ĉiun esperantiston.

— Kiel? Ĉu eĉ vi parolas tiel? — li demandis surprizite.

— Nature. Nome Esperanto estas la sola ilo, kies uzado povas kaŭzi nur bonajn rezultojn. Esperantlingve oni povas same mensogi kiel nacilingve, sed se la popoloj komprenos unu la alian, tio rezultigos nur interpacigon kaj ĉesigon de malamo. Kaj tio estus la plej granda danĝero por la mond' eterne militanta.

Li skuis la kapon: — Vi ne povas min konvinki. Mi malamas Esperanton.

— Ne tro ĝentila respondo. Eĉ mi mem malamas idiotajn homojn, sed mi ne deklaras miajn maleslimon malkaŝe al ili.

— Bedaŭrinde ni devas disiĝi, — li diris ofendite. — Mi jam devas iri flanken.

Ni adiaŭis. Li flankeniris, mi daŭrigis miajn paŝojn rekte.

Al la vojo elektita...

(El "Esperanto en Slovakio", kiu siavice reprenis ĝin el "La Progreso".)

D-ro V. T. Miškovská

## PANGLOTTIA

de Comenius

PANGLOTTIA estas la kvina el la sep partoj de Comenius-verkaro titolita "De rerum humanarum emendatione konsultatio catholica" /Generala konsulto pri plibonigo de homaj aferoj/. Nur dudektri jarojn ni konas ĉi-tiun verkaron, kies manuskripton oni trovis en Halle /GDR/. Post la dua mondomilito PANGLOTTIA estis ĉeĥen tradukita de komeniologo Josef Hendrich, sed ĝis hodiaŭ ĝi ne estis tiel bonŝanca kiel Pampédie kaj Panorthosia, kies tradukoj de la sama komeniologo jam aperis.

PANGLOTTIA dume restas nealirebla al pli larĝa publiko. Ĝi enhavas sisteme aranĝitajn filozofiajn pensojn de Comenius pri Lingvo internacia artefarita, pli frue menciitajn en lia verko "Via lucis" /Vojo de la lumo/. La diferenco de lingvoj nesufiĉe konsekvencaj en la konstruado, la malfacilaĵoj, kiujn lernante oni renkontas, kaŭzis multe da misakordoj kaj konfuzoj. Estas do



necese inventi tute novan lingvon sen malregulaj formoj kaj facile lerneblan de ĉiu tutmonde. Oni trovas en Panglottia seriojn da ekzemploj destinitaj por montri la manieron, per kiu la lingvo povus formiĝi. Ili abundas, precipe en la aldonon nomita "Novae linguae harmonicae tentamen primum" /Unua provo de nova lingvo harmonia/, tekstita probable en jaro 1665. La kreado de vortoj kaj sintaksaj konstruadoj

ĉi-tie ne celas konstrui perfektan sistemon. Temas nur pri serio da ekzemploj, kiuj surprizas per sia pensoriĉo kaj originaleco. La esprimmaniero tie troviĝas multobligita per adopto de granda nombro da elementoj tiritaj el multaj lingvoj, kiujn la aŭtoro konis kaj lerte kombinis.

Kompleta ellaborado de lingvo internacia supozigus laŭ Comenius, ellaboron de Pansofio de konkretaj unufojn perceptitaj per ekkono filozofia — tia sistemo pansofia povus naskigi adekvatan sistemon de esprimperado. Se do la lingvo-konceptaĵo de Comenius ne prezentas kompletan sistemon, tamen la aŭtoro vidigas la vastan amplekson de tiam unika fantazio ĉiam logik-reale majstrita.

Baldaŭan aperon de PANGLOTTIA en latina originalo sendube salutos ne sole specialistoj-komeniologoj, sed ankaŭ filologoj kaj partianoj de paca konkordiĝo de nacioj volonte uzontaj la universalan lingvon kiel unu el plej bezonaj instrumentoj de la homara socio.

El "J. A. Comenius — Bulletin d'information II" tradukis Jana Čichová/Praha/

# CED

Centro de Esploro  
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo  
Telefono ARNold 90-81

## KIO INSTIGIS VIN LERNI ESPERANTON?

Rezultoj de Enketo inter kelkaj konataj esperantistoj

Antaŭ kelkaj monatoj la prezidantino de Komuna Konversacia Klubo en Kopenhago, s-ino Kirsten Zacho, turnis sin al la direktoro de CED kun la peto sugesti taŭgan internacian aranĝon por unu el la kunvenoj de la klubo. La direktoro de CED konsilis fari enketon inter kelkaj konataj esperantistoj de diversaj landoj pri jenaj demandoj:

1. Kio instigis vin lerni Esperanton?
2. Kion donis al vi Esperanto en la vivo?
3. Kial vi fidis al plua disvastigo de la lingvo kaj al ĝia fina enkonduko en ĉiujn internaciajn rilatojn?

Al la tri demandoj alvenis respondoj de Mag. W. Auld, J. Baghy, Prof. E. Bokarev, M. Boulton, Prof. W. E. Collinson, Gian Carlo Fighiera, Prof. I. Lapenna, Doc. D-ro P. Neergaard, Doc. J. Régulo Pérez, Prof. E. Privat, Mag. R. Rossetti, Ivo Rotkvić, Lic. Tibor Sekelj, Muz. Kuratoro C. Stöp-Bowitz, D-ro F. Szilágyi, Rektoro K. Söderberg, Prof. G. Waringhien, Prof. Hideo Yagi.

La kontribuaj estis legitaj dum unu el la kunvenoj de Komuna Konversacia Klubo kaj la originalaj respondoj estis poste disponigitaj al CED por trastudo.

El la enketo sekvas, ke diversaj kaŭzoj instigis la enketitojn al la lernado de la Internacia Lingvo, sed ke ili ĉiuj ellernis ĝin tre frue: kelkaj jam kiel knaboj, aliaj kiel gejunuloj. Al ĉiuj la scio de la Internacia Lingvo donis diversajn praktikajn servojn, sed la moralaj-intelektaj valoroj, akiritaj per Esperanto, prezentas ĉe la plimulto la plej grandan utilon. Du el la enketitoj ne havas **absolutan** fidon, ke Esperanto enkondukiĝos en ĉiujn internaciajn rilatojn, sed ĉiuj estas konvinkitaj pri ĝia plua disvastigo.

Ne estas eble prezenti ĉi tie pli detale la tre interesajn respondojn. Komuna Konversacia Klubo ĵus eldonis broŝuron kun ĉiuj respondoj sub la titolo "Enketo pri Esperanto". La interesigantoj bonvolu mendi ĝin rekte ĉe **Komuna Konversacia Klubo, Randsbølvej 4, Kopenhago F, Danlando**. Prezo 1,50 danaj kronoj aŭ 3 respondkuponoj.

## MATERIALOJ POR INDEX TRANSLATIONUM

Mag. W. Auld, kunlaboranto de CED por Bibliografio, ĵus finis novan gravan laboron: bibliografion pri la Esperantilingvaj tradukoj en la jaroj 1956 kaj 1957 por la verko Index Translationum, kiun eldonas UNESKO. La materialo estas jam sendita al la redakcio de Index Translationum, kiu utiligos ĝin en la volumo X.

## ESPERANTO TRADUKOJ EN LA VOL. IX DE INDEX TRANSLATIONUM

En la volumo IX de Index Translationum troviĝas ĉiuj Esperantilingvaj tradukoj, kiuj pro eraro de la redakcio estis ellasitaj el la vol. VIII. Tiamaniere tiu gravega verko, eldonata regule de UNESKO, enhavas ĉiujn Esperantilingvajn tradukojn, kiuj estis publikigitaj inter 1945 kaj 1955. La sola escepto rilatas al la tradukoj el Ĉinujo, kiuj ne povis eniri, ĉar en la verko entute mankas bibliografio pri la tradukoj en tiu lando. La Redakcio de Index Translationum esprimis en la antaŭ-

parolo al tiu ĉi volumo sian dankon al CED pro la listo de verkoj, tradukitaj en Esperanto. La bulteno de UNESKO "UNESCO-Features" publikigis en la n-ro 283 de la 7-a de aprilo 1958 artikolon pri la lasta volumo de Index Translationum, en kiu estas menciitaj ankaŭ Esperanto-tradukoj.

Superflue diri, ke la Esperanto-tradukoj fine eniris en Index Translationum nur dank' al la ekzisto de CED kaj al la laboro de ĝiaj kunlaborantoj, inter kiuj Mag. W. Auld plenumas unu el la plej gravaj taskoj kun admirinda precizeco.

## DONACIOJ POR CED

	£	ŝ	p
Stato je la 6-a de marto 1958 . . . . .	21-15	4	
S. K. Walden, Svedujo . . . . .	2-15	2	
S. B. Englund, Svedujo . . . . .	1-0	8	
S-ro Fl. Slogar, Jugoslavio . . . . .	10-3		
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando (tria donaco) . . . . .	10-3		
S. A. Burghardt, Germanujo . . . . .	8-6		
S. P. Williams, Novzelando . . . . .	5-0		
Kolektita en la Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago . . . . .	5-5	0	
S. J. Jungton, Usono . . . . .	7-1		
S. F. Helmuth, Usono . . . . .	3-17	10	
S. A. Wesser, Usono . . . . .	6-2		
Svisa Esperanto-Societo, Svislando . . . . .	8-3	2	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando (kvara donaco) . . . . .	10-1		

Stato je la 26-a de aprilo 1958 . . . . . 45-5-10

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C, Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris, X, Francujo; al ĉefdelegitoj aŭ perantoj de U.E.A. aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.



"Kara filo, lasu tiajn stultaĵojn kaj lernu seriozajn aferojn!"

## Monda Galerio :



Dekdu jarojn daŭris la laboro de la Majstro Wit Stwosz (Vit Stviŝ) pri la altaro de Sta Maria, kiu estiĝis antaŭ ĉirkaŭ 500 jaroj. Wit Stwosz en tiu ĉi verko ensorcis la tutan sian grandecon, genion de sia artismo. Kvan-

kam la temoj estas religiaj la alveninta el Nurnbergo Majstro elfermis en ili la tutan galerion de karakterizaj tipoj de tiama Krakovo (historia urbo en Polujo). Li montris ĉe tio ne malgrandan konon de scienco, anatomio,

## Grandeco

## ensorcita

## en

## lignon

fiziologio, precipe psikologio. Krom figuroj precipe ligitaj kun la temoj de la altaro Wit Stwosz alsortis en lignon scienculojn, metiistojn, ascetojn, kaj manĝegulon. Kun granda kono li montras iliajn sentojn kiel malesperon, malĝojon, ĝojon aŭ koleron kaj ravi-tecon.

Rigardante la altaron ni rimarkas vestojn de pola loĝantaro, meblojn kaj ilojn. Eĉ botanikistoj trovas en la verko de Majstro Stwosz ne avaran mondon de plantoj kaj bestoj. Ne estas troigo ke la artisto enlokis en la ligno tutan epokon en kiu li vivis. La meza parto de la altaro montras la scenon de la endormiĝo de la Sta Madonna en la rondo de la apostoloj. Ĉi estas la elmonro de la granda homara dramo dinamismoplena. La figuroj ĉirkaŭ 3 metrojn altaj estas faritaj el unu peco de la ligno, 500 jaraj trunkoj de malnovaj tilioj estas kovritaj per diverskolora polikromio. Al aliaj partoj de la altaro (ekzemple montrantaj la tutan vivon de la Kristo) estas la tuta galerio de homoj de diversaj sociaj grupoj.

La plejgranda ĉefverko de la monda skulptarto (ne nur de XV jarcento) post kelkjara renovigado revenis al sia antaŭa loko en la ĉefa navo de la preĝejo de Sta Maria en Krakovo, por kiu preĝejo speciale Wit Stwosz tiun ĉi verkon kreis.

**W. Włodarczyk**







## Internacia Lingvo

### por infanoj

Si estis veninta por kompili raporton pri kuriozaĵo kaj ŝi trovis — lingvon, neniom krom lingvo parolata. "Se eĉ infanoj parolas ĝin tiel memkompreneble kaj senpene", miris la sperta absolute sobra ĵurnalistino, "se eĉ infanoj ĝin manipulas tiel facile kaj flue, ĝi ja fakte estas vivanta lingvo!" Ŝi tute ne simpatiis kun la Internacia Lingvo kaj kredeble ankaŭ post du plurhoraj intervjuoj ne jam inklinas arde aprobi ĝin. Sed dum ŝia vere amika vizito en esperantista familio evidentiĝis alia kaj multe pli da intereso, ol la profesia scivolo postulas. Konstatinte ke la sepjara kaj kvinjara infanoj bone regas eĉ la nacian lingvon, ŝi ne povis kaŝi surprizon pri la natureco, per kiu rolas nia lingvo en samideana familio.

La instruon el tiu ne eksterordinara okazintaĵo ni konsideru ne nur laŭ propaganda vidpunkto. Tiam margenan efikon ĝi logike rezultigas ĉe klera objektiva homo. Ni rigardu la alian konsekvencon, kiun celis D-ro Zamenhof dirante: "Hereda lingvo de la plej malgranda popolo havas vivon multe pli garantiitan ol senpopola lingvo kun eĉ milionoj da uzantoj." La ideon, herede transdoni nian lingvon al siaj infanoj, ĝis hodiaŭ praktikis centoj da gepatroj. La aplikado de Esperanto kiel familia lingvo celas ne nur la denaske dulingvan edukon de niaj infanoj, sed la esperantistigon de la tuta familio kaj fine la efektivan uzadon de nia lingvo kvazaŭ popola idiomato. Tiu ideo tute ne estas moderna invento. Jam en la unuaj jardekoj de nia juna historio kelkaj konsekvencaj amikoj konsideris morala devo, heredigi al siaj idoj tiun nematerian trezoron. Ili sekvis la tute naturan vojon de lingvotransdono, laŭ la ĉiam observebla ekzemplo de la naciaj lingvoj. El esploroj faritaj oni povas konkludi, ke hodiaŭ ekzistas pli ol 400 denaskaj esperantistoj. Certe ne ĉiuj gepatroj vidas ŝancon por eduki siajn infanojn nialingve, sed multaj la eblon havas kaj ne utiligas ĝin. 400 vere ne estas tro alta nombro, tamen konsiderinda tial, ke precipe en la lasta jardeko ĝi kontinue kreskis, je kiu favora evoluo ankaŭ la energiaj klopodoj de Bulteno Gepatra kaj ĝiaj legantoj decide kontribuis. Dum pli ol dekjara ekzisto Bulteno

arigis ĉirkaŭ si familieran rondon de progresemaĵoj kaj amikoj, kiuj komprenas, ke nek esperantista baptopatro nek esperantlingva nomo nek gazeta anonceto faras denaskan esperantiston, sed sole la denaske ankaŭ-esperantlingva eduko.


Lingva edukado tamen ne estas tasko aplikebla nur kiel denaska. La instrumentado, kiun Andreo Cseh ellaboris kaj praktikas, certe ne estas destinita al suĉinfanoj. Sed ankaŭ ĝi baziĝas sur la natura metodo, kiun aplikas ĉiu patrino en la mondo kun sia senpova etulo tiel senhezite, ke paroli pri metodo estas blago. Nu certe, ŝi uzas nur unu lingvon kaj la problemoj ja estas la transdono de dua. Kiu konsideras, ke milionoj da homoj de junaĝo parolas du naciajn lingvojn aŭ eĉ pli, tiu certe ne dubas, ke la aplikado de nia lingvo pro ĝia strukturo havas multe pli grandan ŝancon al sukceso. Tamen la supre menciitan varbefikon ni ne tro akcentu, ĉar nur ŝercema, naŭva aŭ trompema homo propagandas ideon, kiun

li mem ne kredas sufiĉe valora por intense okupiĝi pri ĝi. Neniu el ni kontestas, ke Esperanto estas vivanta lingvo. Sed mirige, en periodo de ĝia evidenta praktikado sur preskaŭ ĉiu tereno de interhoma komunikado ne mankas argumentoj kontraŭ uzado de la Internacia Lingvo en la familia medio, kun la edzkonulo, kun la infanoj.

Imiti la ekzemplon de tiuj gepatroj ne signifas riski eksperimenton, ĉar la rezultoj atingitaj pruvas ne nur la eblecon de tia procedo, sed klare vidiĝas ankaŭ tri eminentajn avantaĝojn.

Unue por la infano mem: Ĉi ne bezonas lerni la lingvon plimalpli pene studante ĝin eventuale eĉ krom aliaj gravaj studoj. La infano jam junaĝe akiras pensadon internacian, tutmondan koncepton. En la lerneja aĝo vere utilas nia kiel dua (aŭ unua) nature akirita, logika lingvo, kiu tre ege helpas klarigi la gramatikajn konfuzaĵojn de la naciaj lingvoj, akriĝas senton pri logiko kaj komprenigas multajn fremdajn vortojn. Tia edukado al kvazaŭ realisma idealisto okazas per nura, sed natura lingvo-praktikado.

Due por la edukanto: La lingvo servas kiel ĉiutaga instrumento de komunikado, la parolo fariĝas pli flua, pli libera per konstanta ekzercado. La vortprovizo necese ampleksiĝas, ĉar infanoj scias demandi, demandadi: "Patro, kio estas en tiu stranga ujo? Panjo, kial tiu sinjorino havas ruĝan nazon? Ĉu vere la cikonio alportas infanojn?" kaj tiel senĉese. La konscienca edukanto devas respondi, iel klarigi, ne ĉiam eblas al li konsulti la saĝan vortaron. Kaj konsekvence li



Vidu la fam... kurse dum la 43a U.K.!



Mainz, nokte.

ne povas elturniĝi per nacilingvaj eksplikoj.

Trie por la tuta movado: Per kiom da elspezoj je energio kaj mono ni jaron post jaro klopodas varbi novajn adeptojn kaj jen — fekunda grundo atendas esti kulturata. Ĉu eĉ nur unu fakto, rezultinta el niaj sukcesoj de la lastaj jaroj, povas pli fortigi niajn argumentojn pri vivo kaj plej vasta praktikeblo de nia lingvo, ol la ekzemplo de niaj esperantistaj familioj? "Ĝi ja efektive vivas" devas rekonigi eĉ niaj samtempuloj ne simpatiantaj kun nia mondlingva ideo.

Pli kaj pli da gepatroj proprainiciate, atentigitaj de nia gazetaro aŭ instigitaj de amikoj nun proprigas al si tiujn ĉi spertojn. Aklamo el ĉiuj tavoloj kaj sekcioj de nia movado, fervoro de junaj gepatroj kaj geedzoj, agnosko de eminentuloj maljunaj, kiuj aŭ mem same praktikis, aŭ akcelas la evoluon per kontribuo de eduka materialo, aŭ kiuj lojale kaj publike konfesas, ke ili maltrafis la bonan ŝancon kaj insistas, ke oni ne imitu ilian ekzemplon — tio ĉio estas signoj de esperiga progreso. Ne malmulte helpis ankaŭ la okazigo de la Infana Kongresetoj, kiuj nun jam estas konstantaj aranĝoj en la sino de la Universalaj Kongresoj. Sed ni ne povas neglekti, ke la SAT-Kongresoj avangarde prenis la iniciaton por prezenti apartan programon al geknaboj kaj jam atingis konsiderindan nombron de partoprenantoj. La gvidantoj de tiaj porinfanaj renkontiĝoj ne posedas magiajn fortojn. La aliĝilo por la Infana Kongreseto en Mainz tial prave postulas deklaron pri certa lingvoscio de la infanoj. Ĉar tiu infanejo ja estas nek propaganda kaprico, nek deponejo por tediaj ul-


sed utila, eĉ necesa aranĝo kun varia kaj interesa programo. Ĝi celas kunigi diverslandajn infanojn sur la bazo de nia komuna lingvo, kiu senescepte kaj konsekvence estos aplikata flanke de la vartantoj.

Rezulte el spertoj de pasintaj jaroj la infanaro estos dividata en familiojn miksitaĵn laŭ nacia deveno kaj plejeble egalnivelajn laŭ lingvaj kapabloj. La Kongreseto disponas pri feria domo kun ĉarma ludparketo. La infanoj povas loĝi tie dum la tuta semajno kaj estos prizorgataj de spertaj komisiitoj. Ekskursojn per

fervojo, ŝipo kaj aŭtobuso indikas la programo, krome vizitojn al aviadejo, zoologia ĝardeno, birdejo kaj aliaj vidindaĵoj. La aktoro A. Starke amuzos per gajaj rakontoj kaj poemoj. S-ano E. Perseke vidigos artan pup-teatran spektaklon. La infanoj havos balon en kostumoj kun tombolo, iluminado kaj aliaj surprizoj. Ili vidos filmojn i.a. pri la Marseille Kongreso. Sed apartaj horoj restos rezervataj por komunaj ludoj, por slojdo, kantado, improviza teatro kaj ceteraj okupoj, kiuj senĝene kunigu la karulan rondon.

La Kongreseto krome laŭeble montru la eblecojn, efikon, kaj avantaĝon de ankaŭ-esperantlingva edukado kaj ankaŭ helpu la klopodojn de tiuj gepatroj, kiuj praktikas Esperanton en la familia medio. Kvankam la organizantoj preferus lasi la infanojn neĝenataj inter samaĝaj geamiketoj, tamen oni ne povas ne ekkoni utilon kaj neceson de publika demonstracio. La infanoj do ne estos tute izolataj kiel en Marseille, sed oni ankaŭ ne intencas spektakle prezenti ilin. La Kongreseto tial invitas edukantojn kaj amikojn de infanoj, pasigi unu certan posttagmezon en la medio de la geknaboj, kio ŝajnas esti la plej konvena formo de demonstracio. La vizitantoj povos libere kontakti kun la infanoj, laŭvole oni ludu kaj kantu kun ili, vidu amuzan pupteatron komune kun la infanoj aŭ laŭplaĉe partoprenu interesan diskuton pri la koncernaj temoj. La Infana Kongreseto invitas ankaŭ tiajn gepatrojn, kiuj pro manko de tempo, konvinko, kuraĝo aŭ energio ĝis nun ne ekuzis la ŝancon heredigi nian lingvon, nian plej karan trezoron, al siaj infanoj.

**Kongreseto.**



Romantika Ge...

## Tra la mondo

Esperanto ĉe la 3a Amerika Kongreso de Blinduloj (Montevideo, 3-8 marto, 1958.) Tiu Kongreso akceptis jenan rezolucion, proponitan de ekvadorano Byron L. Eguiguren, prezentitan de boliviano Alfredo Tarifa Sánchez, kaj subtenitan de Urugvajva Esperanto Societo en la persono de M. Fernández Menéndez:

1. Organizi kursojn de Esperanto en la blindulaj institucioj en ĉiuj amerikaj landoj, invitante neblindajn studentojn al tiuj kursoj por stimuli la plej fortajn sociajn interrilatojn inter la blinduloj kaj vidantoj.

2. Faciligu la fondiĝon de blindulaj grupoj esperantistaj en la blindulaj institucioj de ĉiu lando, kiuj subtenos daŭrajn kulturajn interŝanĝojn kun la esperantistaj centroj de la tuta mondo.

3. Rekomendi, ke, kiam la kreskado de la blindulaj grupoj esperantistaj permesos, la Amerika Konsilantaro por Blinduloj estigu efektivan interligon kun la Ligo Internacia de Blinduloj Esperantistaj, por atingi, inter aliaj bonajoj, la uzon de la esperantista kupono (pagoservo), kiu faciligos la akiron de didaktika kulturmaterialo el aliaj landoj.

4. Interesigi ĉiujn gazetojn brajlajn de Ameriko, por ke ili diskonigu la avantaĝojn de Esperanto; kaj same ankaŭ, laŭeble, ke ili enkalkulu en siajn eldonistajn planojn la presadon de tekstoj kaj broŝuroj en la nomita lingvo.

5. Rekomendi al ĉiuj registaroj en Ameriko la enkondukon de la kompleta lernado de moderna fremda lingvo, krom Esperanto, en ĉiuj oficialaj institucioj por blinduloj.

**La svisaj esperantistoj jarkunvenis.** En Langenthal kunvenis Svisa Esperanto-Societo la 15an kaj 16an de marto. En la agrabla programo menciinda estas prelego de d-ro G. Azzi el Como pri "UEA, la kerno de nia movado". Inter la ĉeestintoj speciale efikas la granda nombro da gejunuloj. Reelektiĝis kiel prezidantino f-ino L. Schaerer kaj kiel vicprezidantoj C. Gacond kaj O. Walder.

**Brita Jubilea Kongreso.** La Ora Jubilea Kongreso de la Brita Esperantista Asocio okazis de la 4a ĝis la 7a de aprilo en Edinburgo, ĉefurbo de Skotlando. Dum la kongreso oni prezentis du altnivelajn prelegojn: "Pri koloro" de T. Fraser, kaj "La angla antologio" de W. Auld. En speciala skota vespero oni vidis elstaran montradon de popoldanco kaj aŭdis tre ĉarmajn popolkantojn. La aferkunsidoj postulis vian laboron. Aparte gravis entuziasma esprimo de bona volo al U.E.A.

33a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj okazos la 20an — 22an de julio

en urbo Varna. Tiu kongreso estos kvazaŭ internacia kunveno, ĉar Bulgara Esperantista Asocio invitis 50 eksterlandajn esperantistojn, reprezentantojn de naciaj asocioj, UEA, k.a., kiuj restos en Bulgarujo dum unu semajno kiel gastoj de la Asocio. Krom la kutimaj programeroj, oni ĝuos specialan esperantlingvan spektaklon prezentotan de profesiaj artistoj de la esperanta teatra kolektivo ĉe la komunuma teatro en Sofio, "Trudov front". Por pli da detaloj, turnu vin

al adreso: 33a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj, urbo Varna, Bulgario.

**Tradukoj el "Esperanto".** En "Trees and life", Britujo, printempa numero 1958, aperis anglalingva traduko de la rakonto "Plantado" de S. J. S'fiori, kiu aperis en "Esperanto" n-ro 616. La tradukon faris Ges-roj Fraser (Skotlando).

En "La Dépêche", Toulouse, la 6an de aprilo, 1958, aperis franclingve la artikolo "Ĉu preferu nacilingvo" de W. Auld (kiu aperis en n-ro 628 de

**Wij Juliana, bij de gratie Gods,  
Koningin der Nederlanden,  
Prinses van Oranje-Nassau, enz, enz, enz.**

22 maart 1958  
nr. 49.

Beschikkende op de verzoekschriften ter bekoming van erkenning van de daarin genoemde, voor minder dan dertig jaren aangevane, verenigingen door goedkeuring van hare daarbij overgelegde statuten;

Gelet op de voorschriften der wet van 22 april 1855 (Staatsblad no. 32) in het algemeen en op art. 6, tweede lid, dier wet in het bijzonder;

Op de voordracht van Onze Minister van Justitie van 17 maart 1958, Hoofdafdeling Privaatrecht, Bureau Verenigingen, no. Ver. 57136, Afd. Rechtspersonen

**HEBBEN GOEDGEVONDEN EN VERSTAAN:**

de overgelegde statuten der navolgende verenigingen goed te keuren en deze verenigingen mitsdien te erkennen, te weten:

1e. enz.  
7e. de vereniging: "Universala Esperanto-Asocio (UEA, Wereld Esperanto-Vereniging)", gevestigd te Rotterdam;  
8e. enz.

Onze Minister van Justitie is belast met de uitvoering van dit besluit, enz.

Soestdijk, 22 maart 1958.

(gr.) JULIANA

De Minister van Justitie,  
(gr.) Samkalden.

Overeenkomstig het oorspronkelijke,  
De Secretaris-Generaal van het Ministerie van Justitie,  
(gr.) J.C. Tenkink.

Voor eensluidend uittreksel,  
De Chef van de Secretarie,  
(W.H.J.C. van Gessel).

personecon en Nederlando. Jen  
ri la Reĝa Dekreto.

Vidu la fa



Tallinn, Estonio. La "vivanta gazeto" dum ĉiusemajna kunveno de esperantistoj. La malgrandaj esperantistoj- infanoj dancas.



Japana esperantistino Joŝiko Kagino kun s-ro Ole Nederaland, redaktoro de Dansk Esperanto-Blad. Li funkcias kiel ŝia interpretisto en Odense, Danlando.

"Esperanto"), en traduko de Robert Belmont.

**Oficiala permeso pri eksperimenta instruado de Esperanto en Danlando.** Lerneja direkto por la komunumaj lernejoj en Kopenhago donis permeson pri eksperimenta instruado en Esperanto en Vibenshus lernejo ekde venonta jaro en la deviga lecionaro. 4a unuagrada klaso daŭrigos la instruadon dum 2 jaroj, tiel ke la studado de Esperanto fariĝos preparo por la instruado de aliaj fremdaj lingvoj, simile al eksperimentoj en Skotlando kaj Jugoslavio. La instruistino estos Roma Thorsen.

**Arĝenta Sprono de KOKO.** Por "sproni" verkadon de originala literaturo en la internacia lingvo la kooperativa eldonejo KOKO, Kopenhago, decidis inaŭguri literaturan honorpremiion: **Arĝenta Sprono de KOKO.** La premio konsistas el pinglo kun arĝenta sprono krom diplomo. Pli poste estos eventuale aldonata mona donaco de la eldoneja profito. Kandidato por tiel fariĝi **Aŭtoro de la jaro** povos esti ĉiu verkisto, ĉu momente elstara, ĉu novulo promesa en la beletra, originala esp-literaturo. Neniu povas persone pledi por la premio, sed Eldonejo KOKO invitis al la Internacia Verkista Asocio prezenti liston de kandidatoj. La premio estos solene transdonata ĉiujare kun buŝa motivigo dum la Universala Kongreso pere de reprezentanto de Eldonejo KOKO.

La **dana ministro de internaj aferoj**, mem esperantisto, estas la protektanto de la jarkunveno de CDEL okazonta en Kopenhago. Li jam publike parolis Esperanton en Faaborg.

**Esperanto-lernolibroj en montrofeneŝtoj de multaj librovendejoj!** La Esperanto-lernolibroj por franclingvuloj eldonitaj de Editions Nova en Mulhouse estas nun haveblaj en preskaŭ ĉiuj librovendejoj ne nur en Francujo, sed ankaŭ en aliaj landoj ekzemple en Belgujo, Svisujo, Kanado

k.a. Tiu rezultato estas grava atingo, precipe laŭ propaganda vidpunkto: ju pli da lernolibroj pri Esperanto troviĝas en montrofeneŝtoj de librovendejoj, des pli da preterpasantoj "malkovros" la internacian lingvon, kaj interesiĝos pri ĝi. Librovendistoj, kiuj ankorau ne havas stokon da NOVA-libretoj, povas mendi ilin pere de sia metropola liveristo pogranda, aŭ senpere ĉe Maison du Livre Francais, 4 rue Felibien, Parizo, aŭ ankaŭ ĉe Hachette, Parizo.

**Esperanto-rubriko en latva gazeto.** La latva dusemajna grandskala gazeto **Zvaigzne** (Stelo), kiu en la pasinta jaro publikigis kurson de Esperanto, nun aperigas kvaronpaĝan Esperanto-anguleton. Leteroj al la redakcio estos bonvenaj, se interesaj. Adreso: Zurnals "Zvaigzne", Riga, Latvia SSR.

**Esperanto en la pola gazetaro dum 1957.** Oni kalkulas, ke en la pola gazetaro en 1957 aperis ĉ. 500 artikoloj,



En la

Romantika

mencioj pri Esperanto. En kvar gazetoj aperis kurso de la lingvo. Kvankam la "Pola Radio" ne enkondukis ankoraŭ konstantan esperantan rubrikon, tamen diversaj fakoj de la Radio sufiĉe ofte disaŭdigis diversajn komunikojn pri Esperanto kaj pri la movado. Ankaŭ la unuan fojon televido interesiĝis pri la movado prezentante la solenaĵon ĉe la tombo de d-ro Zamenhof okaze de la 40-jara datreveno de la morto.

**Esperanta Filmvespero.** La Roterdama Esperanto-Komitato prezentis je sabato la 26an de aprilo programon de esperantlingvaj filmoj el tri landoj, havigitaj pere de la Filma Servo de UEA. En la programo estis ankaŭ prelego de Mag. Sigismundo Pragano, pri "Lingvaj aspektoj en neesperantistaj kongresoj".

**La 29a Itala Kongreso de Esperanto** okazos en Palermo de la 23a ĝis la 27a de aŭgusto. Eksterlandanoj ne pagas aliĝkotizon. Adreso de LKK: Comitato Organizzatore del 29° Congresso Italiano di Esperanto, Via Tripoli 15, presso Abate, Palermo, Italujo.

**Interesa serio de poŝtkartoj.** La Sicilia Delegacio de la Itala Esperantista Federacio eldonis serion de 18 poŝtkartoj, kiuj prezentas grandformate la poŝtmarkojn ĝis nun eldonitajn kun teksto en Esperanto. La serio, kiu estas aĉetebla ĉe la Sicilia Delegacio de Itala Esperanto Federacio, Corso Vittorio Veneto 92, Ragusa, Sicilio, kostas unu usonan dolaron aŭ 10 rpk. Oni aldonu 10% por la sendkostoj.

**Internacia Rondo de Arkitektoj** estas fondita. Fakuloj estas petataj informiĝi ĉe: Ark. Tekn. Vladimír Štruceľ, Krašova ul. br. 27/IV, AGREB, Jugoslavio.

**"Nuntempa Bulgario"** daŭrigos en la sian aperadon en la sama plaĉa ĵurnalo, kun bonega enhavo, riĉaj informoj pri la kulturo, arto, ekonomio de la bulgara popolo. La malalta aliĝkotizo de 1.5 us. dol.

### Librosugesto de la monato

KREDU MIN, SINJORINO de Cezaro Rossetti. 260p. Prezo: 5.40 glđ. (21.60 steloj).

Forta kandidato por "la plej interesa libro en Esperanto". Versajne la plej vigle vivanta lingvaĵo en nia tuta literaturo. Kaj tre certe la plej taŭga legolibro por progresantoj, ĉar la streĉe interesa historio certigas la finlegadon, kaj la vigla lingvaĵo certigas senperan komprenon!

(16 steloj) por 12 numeroj ebligas al ĉiu esperantisto aboni ĝin.

**Someraj esperantistaj lernejoj de G.E.E.** La konata franca "Grupo de Esperantistaj Edukistoj" organizas dum tiu ĉi somero du esperantistajn renkontojn. Unu okazos en La Tranche sur Mer (Vendée) de la 4a ĝis la 25a de aŭgusto, kaj entenos kursojn por komencantoj kaj progresantoj. La dua okazos en Besançon (Doubs) de la 10a ĝis la 31a de aŭgusto. Tiu ĉi estos Internacia Kultura Foiro por jam spertaj esperantistoj, kaj entenos superan kaj perfektigan kursojn. Aliĝkotoj: 1800 fr. fr. por unu persono, 3000 fr. fr. por du samfamilianoj. Informojn petu, kaj aliĝkoton sendu, al: s-ro Bidoit, 6 rue de la Paix, Baugé (M & L). Turismajn informojn pri Besançon vi povas ricevi pere de s-ino Tresorier, 2 rue des Lilas, Besançon (Doubs), Francujo.

**Internacio de Militrezistantoj** (88 Park Avenue, Enfield, Middlesex, Anglujo), kiu jam de multaj jaroj konsekvence aplikas la internacian lingvon, ĵus aperigis novan libreton: "Aktiva Porpaca Laborado".

**La Esperanto-organizo en Jugoslavio ĝuas 50% ferojrabaton.** Per petskribo de la 1-a de marto 1958, Jugoslavia Esperanto-Federacio petis la Ĝeneralan Direkcion de Jugoslaviaj Fervojoj aprobi ankaŭ al ĝi, same kiel al aliaj amasorganizoj, ferojrabaton por kolektivaj vojaĝoj. La Ĝenerala Direkcio de Jugoslaviaj Fervojoj per sia dekreto N-ro 140-18/58 II-1 BR/V de 31a de marto 1958 aprobas la 50% ferojrabaton por kolektivaj vojaĝoj laŭ la para. 19 de koncerna tarifo, kaj informas, ke la dekreto estos publikigita en Tarifsko-transportni vestnik n-ro 8/58 de 15a de aprilo 1958, kaj post tio la anoj povas utiligi la rabaton.

**Esperanta Loterio** estas aranĝita de Jugoslavia Esperanto-Federacio kun permeso de la Ŝtata Konsilantaro por financoj. La lotumado okazos dum la 17a Jugoslavia Esperanto-Kongreso en Novi Sad, la 5an de julio 1958.

**Zamenhof-Monumento en Wi** estas inaŭgurota la 27an de julio. La Protektoraton transprenis A. A. tria Federacia Kanceliero. Raab.

**Listo de entreprenoj kies estro, aŭ almenaŭ unu oficisto, estas kapabla servi la klientojn per Esperanto, estas redaktata de s-ro M. Rétot, 162 Bd. Aristide-Briand, Montreuil (Seine), Francujo.** Tiaj personoj estas petataj anonci sin al tiu adreso.

**Ekspozicio en Oviedo.** La Esperantista Klubo "Nordo" en Oviedo, Hispanujo, aranĝis alloge prezentitan esperantan ekspozicion. Provinca kaj urbaj aŭtoritatuloj ĉestis la malfermon, kaj la Ovieda urbestro decidis subvencio de 1,000 pesetoj kiel kontribuon al la elspezoj de la aranĝo. La Klubo donacis al la Ĝenerala Provinca Militestro belan serion de esperantaj poŝtmarkoj kiel memorajn de lia vizito.

**"Ili havas ĉion komuna".** Sub tiu titolo la Societo de Gefratoj (Wheat-hill Bruderhof, Bromdon, Bridgnorth, Shropshire, Anglujo) eldonis 8-paĝan libreton, kiu priskribas la celojn de la komunumo. Ĝia prezo estas 1 stelo aŭ 1 rpk.

## ŜAKA RUBRIKO

Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio

### Ŝaka kunveno en Mainz

Dum la 43a Universala kongreso ree kunvenos esperantistaj ŝakistoj. La kunvenon prezidos s-ano T. Lindberg, prezidanto de preparkomitato de EŜLI. Ni petas partoprenantojn, ke ili sekvu oficialajn informojn de LKK kaj informojn en kongresejo, por ĝustatempe sciigi pri preciza horo de la kunveno. Jam nun estas certe, ke la nombro de partoprenantoj estos pli granda ol pasintjare. Dum la kunveno oni parolos pri organizaj demandoj, ankaŭ pri diversaj proponoj pri ŝaka revuo en esperanto, pri aperigo de ŝaka fakterminaro ktp.

Ni petas, ke ĉiu ŝakisto, kiu partoprenos la kongreson, informu s-anon T. Lindberg, Prässebo, Svedujo. Se li havos sufiĉe da antaŭaj anoncoj, li povos prepari programon por eventuala dua — pure ŝaka — kunveno. Dum tiu kunveno okazos aŭ rapidluda turniro. aŭ matĉo kontraŭ anoj de Mainza ŝaka klubo.

### Korespondturniroj de EŜLI

Niaj turniroj jam funkcias. Estas nur necese, ke al ili aliĝu samideanoj el plej multaj landoj. Ni varme rekomendas al partoprenantoj, ke ili uzu partoprenon en la turniro por propagando. En via ŝaka klubo en ĝiaj turniroj ni ninostro montru indkartojn de novaj lokojn aŭ nur landojn, en kiuj loĝas ceteraj partoprenantoj. Per konciza teksto akcentu, ke temas pri turniro, organizata helpe

de Esperanto. Aldonu kelkajn bele afrankitajn korespondaĵojn de viaj kontraŭuloj.

Al niaj turniroj povas aliĝi ĉiu esp. ŝakisto. Aliĝkoto estas 10 respondokuponoj /el landoj, kie rk. ne ekzistas, oni pagas nenion/. Aliĝojn sendu al s-ano Jean Duthilleul, 35 Rue de Bayeux, Caen, Francujo.

En venonta rubriko ni publikigos informojn pri unuaj grupoj.

### Kion vi deziras en nia rubriko?

Post apero de unuaj rubrikoj ni ricevis multajn leterojn vere el tuta mondo. Ĉiuj kun ĝojo salutis reaparon de la rubriko en nia revuo. Tiuj ĉi leteroj certe estas tre agrablaj al ni — sed ni petas vin, skribu al ni, kion vi deziras havi en la rubriko: ĉu partiojn, ĉu problemojn, ĉu informojn el esp. ŝaka vivo, ĉu informojn pri tutmonda ŝako ĝenerale? Kaj ni petas, kunlaboru kun ni. Sendu al ni originalajn problemojn, etudojn, belajn partiojn kun rimarkigoj.


### Adresaro de EŜLI

Dum lastaj 10 jaroj ni registris jam preskaŭ 400 adresojn de esp. ŝakistoj. Sed ni timas, ke multaj adresoj jam malaktualiĝis. Ni do estos tre dankaj al afablaj samideanoj, kiuj bonvolos helpi nin kaj povos kontroli aktualecon de adresoj el ilia lando. Bonvolu skribi al gvidanto de la rubriko.

**Solvo de problemo nro 2 (el Esperanto n-ro 625)** K b6-a7. Ĉis fino de marto venis solvoj el 11 landoj.

#### Problemo nro 5:

Helmut Rössler, Germanujo.  
(1-a honora mencio en Schwalbe 1953).



Mato en du movoj.

Kontrolo:

B1.: Ra6, Dg6, Tb5, Kh8, Cdl, Cff, Pa2, c3, d5, e2, f4 (11).

Ni.: Rc4, Df3, Td7, Th5, Ka1, Pa4, a7, e6 (8).

Solvojn sendu al gvidanto de la rubriko ĝis 30.9.1958.

## OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 8

Majo 1958

### Nova Fakkunveno:

Studenta Tutmonda Esperantista Ligo okazigos fondkunvenon dum la Universala Kongreso.

Adreso: S-ro Sven Ziegler, Bjerne-devej 62, Kopenhago Brh., Danlando.

### Faka vizito:

Limigita nombro da esperantistaj fervojistoj rajtos viziti la signalrigardejon en la ĉefstacidomo de Frankfurto, la plej modernan en Eŭropo.

### Fervojista kunveno:

Internacia Fervojista Esperantista Federacio okazigos, en la kadro de la Kongreso, publikan kunvenon kun referaĵo pri "Raciigado — Modernigado — Aŭtomatigado ĉe la Germana Federacia Fervojoj". La nefervojistoj estas invitataj.

### Flagoj:

135 germanaj urboj decidis disponigi al Mainz siajn flagojn por feste ornamati la stratojn honore al la Universala Kongreso.

### Statistiko:

(ĝis fino de aprilo) Alĝerio 2, Aŭstrujo 26, Belgujo 26, Brazilo 6, Britujo 148, Bulgarujo 11, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 85, Etiopio 1, Finnlando 14, Francujo 296, Germanujo 507, Grekujo 2, Hispanujo 15, Hungarujo 6, Islando 6, Israelo 1, Italujo 73, Japanujo 2, Jugoslavio 48, Maroko 7, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 105, Norvegujo 27, Novzelando 4, Pollando 9, Portugalujo 2, Sudafriko 1, Svedujo 120, Svisujo 38, Urugvajo 1, Usono 10, Venezuelo 2, Sovetunio 2. Entute 1609 el 34 landoj. (Pasintjare 1025 el 35 landoj).

G. C. Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario

## KORESPONDA SERVO MONDSKALA

### Oficiala Servo de U.E.A.

Kiel mi jam indikis tion en la lastmonata numero de Esperanto, ankaŭ dum la monato junio mi petas la uzantojn de K.S.M. ne fari novajn petojn pri korespondadreso. La kialon mi klarigis pasintmonate. Ekde la komenco de julio ĉiuj povos skribi al K.S.M. kaj peti, kiel antaŭe, peradon de adreso de korespondantoj ĉar mi, kiel sola prizorganto de tiu ĉi servo, tiam havos multan tempon por dediĉi al ĝi.

Hodiaŭ mi deziras doni gravan konsilon al ĉiuj, kiuj jam havas korespondantojn aŭ esperantistajn

amikojn en fremdaj landoj. Skribu amase al la Franca Radio, petante transdonon de mesaĝo en Esperanto, kune kun disaŭdigo de disko, al unu aŭ pluraj el viaj esperantistaj konatoj loĝantaj en alia lando. Tion farante, vi unue plezurigos amikon (kiu konscios, ke vi ne forgesas lin) kaj plie vi aŭdigos Esperanton al vaste gaŭdantaro de la ĉefa franca radiostacio ("France 1"), en elsendo internacie aŭskultata: "Bonan vesperon, Eŭropo, tie ĉi Parizo!" Jam kelkfoje oni aŭdis tie esperantlingvajn mesaĝojn (en tiu elsendo, kiu cetere havas Esperanto-paroliston), sed jam delonge estis nenio plu pri aŭ en nia lingvo, ĉar... neniu esperantisto alskribas la stacion. Tial ĉiu el vi, kiuj legas tiujn ĉi liniojn, prenu la rezolucion baldaŭ skribi por peti disaŭdigon de iu disko (muziko klasika, aŭ moderna, aŭ eĉ varietea, laŭplaĉe!) omaĝe al iu eksterlanda amiko kaj aldoni (kompreneble) esperantlingvan teksteton de saluto legotan ĉe la mikrofono.

Jen la necesaj informoj. ADRESO: Franca Radio-Televideo, elsendo "Bonsoir l'Europe, ici Paris!", 107, rue de Grenelle, PARIS-7, Francujo. La elsendo aŭdigas ĉiusabate dum du horoj, de la 10a vespere ĝis noktomezo (laŭ Mez-Eŭropa Tempo) kaj la ĉefa ondolongo estas: 1829 metroj (longaj ondoj), sed ankaŭ laŭ mezlongaj kaj mallongaj ondoj (petu informojn ĉe la Stacio). Skribu ĉiam nur en Esperanto. La sukceso ĉe tiu tre grava internacia elsendo dependas nur de vi: tion pruviĝis antaŭ du jaroj, kiam ili dediĉis al la esperantaj mesaĝoj du plenajn elsendojn duhorajn. Ne forgesu do skribi tre baldaŭ!

Daniel Luez.

### En Grésillon Esperantistaj Kulturaj Semajnoj (10-31 Aŭgusto)

Certe tiu aranĝo estos unu el la plej sukcesplenaj. Dum tiu periodo, el kutime, la Kastelo estos abelujo, la nura bedaŭro por pluraj, estos havi la tempon partopreni aktivajn.

Fakte, la ĉiutaga prezen-  
tigas jene:

Matene, tri esperanto-kursoj: la unua por la francaj komencantoj; la

dua por la praktikantoj, kiuj ankoraŭ ne tre bone majstras la lingvon; kaj la tria por la plej lertaj, kiuj deziras praktiki Esperanton, kaj ĝin studi plifunde (studo de tekstoj, gramatiko, pedagogio). En tiu tria kurso profite partoprenos la gesamideanoj kiuj instruas — aŭ deziras instrui — la internacian lingvon.

Posttagmeze, de la 14-a ĝis la 16-a: bindarto kaj plektarto. De la 17.30 ĝis la 18.30, interparolado per grupetoj, sub gvidado de la profesoroj. Intertempe, estas la momento de la bano, de la manĝeto, kaj de la ripozo.

Vespere, de la 21-a ĝis la 22.30, oni ĉeestas, en la Salonoj, la kulturajn aŭ amuzajn vesperkunvenojn, kies programo jam aperis en niaj "Kajeroj".

Nur tiun aldonon: ni ĝojas pro la anoncita ĉeesto — aŭ vizito — de pluraj eksterlandanoj; tiele, vere internacia estos ankoraŭ ĉi-foje la etoso en nia eta Esperanto-lando.


Konklude: estas la ĝusta — eble la lasta — momento por sin anonci en la Esperantista Kulturdomo, Kastelo de Grésillon, Baugé (Maine-et-Loire) — Francujo. (Oni estu afabla aldoni respondkuponon).

## El Bulgario

Pasintjare por unua fojo la ĉefurba entrepreno, kiu zorgas pri diversaj korespondaj kursoj por la tuta lando organizis esperanto-kurson por komencantoj. Pro la granda sukceso dum tiu ĉi jaro la kurso daŭras. Ĝis nun lernas esperanton per tiu ĉi kurso pli ol 600 personoj.

En la ĉefurba teatro "Laborista Fronto" funkcias Esperanto-kurso. Ĝin partoprenas 12 el la plej elstaraj artistoj de la teatro kune kun la reĝisorino Sijka Prohaskova. Oni ne nur entuziasme lernas Esperanton, sed ankaŭ preparas teatraĵojn en Esperanto por ludi ilin. La direktoro de la teatro subtenas la esperantistojn artistojn kaj deklaris ke pro la streĉa laboro nun li ne povas lerni Esperanton, sed venontjare ankaŭ li estos kursano en la nova Esperanto-kurso.

petas alsendon de teatraĵoj en Esperanto kaj serĉas kontakton kun teatra artistoj — esperantistoj. La nomo de la teatro "TRUDOV FRONT". Bul. J. ... azov 1, Sofia.



La pacienculo.

# Radio - Babiloj

(14)

La Esperantistoj havas la  
dissendojn, kiujn ili meritas

## Radio I.B.R.A., Stokholmo

Iom stranga afero estas, ke oni, aŭskultante Radion I.B.R.A. mardvespere, aŭdas gesvedojn parol(ad)antaj kaj kantantaj en Stokholmo, sed vibrigas la radiatorcevilon ne la ondoj de radio-sendilo en Svedujo, sed de la sendilo en Tanger en Nord-Afriko. Do ju pli malproksime oni loĝas for de Stokholmo, des pli klare kaj forte oni aŭdas tiujn radio-dissendojn.

Mi, loĝanta en la norda provinco Frislando de Nederlando, tamen plurfoje, ne ĉiufoje, klare aŭdis dissendon de Radio I.B.R.A. Jam longe ĝi regule la lastan mardon de ĉiu monato sendas paroladon kun instruo pri la kristana doktrino de la 20.00-a ĝis la 20.15-a horo (M.E.T.).

La lastajn monatojn la sama stacio dissendas ankaŭ Esperanto-kurson ĉiumarde de la 18.10 ĝis 18.30 (M.E.T.). Gvidas la kurson s-ro Ernfrid Malmgren, prezidinto de U.E.A., sed helpas lin pluraj gesamideanoj, kiuj aktoras dialogojn, rakontas, prezentas enigmojn kaj spritaĵojn kaj kantas. Do estas tute ne seka, sed interesa kaj varia programo. Kaj nsi

Ne pre aŭskultu! Aŭdanta dissendon, bonvolu esprimi viajn opinion kaj dankon al Radio I.B.R.A., poŝtkesto 821, Stokholmo 1, Svedujo.

## Italaj kanzonoj en Esperanto-traduko

La Esperanto-dissendoj de Radio Roma nun estas interesaj kaj variaj. Prelegas kaj inforras alterne ĉiumarde, -merkrede kaj -vendrede de 19.00 ĝis 19.10 (M.E.T.) prof. d-ro Vincenzo Musella kaj s-ro Luigi Minnaja, du entuziasmaj kaj belsone parolantaj samideanoj, regule helpate de samideanino. La alterno de viraj kaj virina voĉoj vere plivigligas la programon.

Radio Roma ŝatas ilustrati siajn Esperanto-programojn per muziko. Interesa kaj varia estis pro la precipe memoriga prelego pri Beniamino Gigli. Por la interesa kaj adekvata por Esperantistoj estas kantado de la tekstoj estas en Esperanto, do plene komprenebla. Tion ni konstatis la 18-an kaj 19-an de marto, kiam f-ino Luciano Salvatori kantis tri kanzonojn premiitajn dum la lasta festivalo de la Itala Kanzono en San Remo en la

Esperanto-traduko de s-ro Luigi Minnaja. S-ro Minnaja estis afable sendinta la tekstojn de la Esperanto-traduko, sed eĉ sen ili mi estus povinta bone kompreni la tekstojn, ĉar la elparolo de f-ino Salvatori, tute nova samideanino — antaŭ unu jaro ŝi eklernis Esperanton! — estis tre klara kaj belsone. Espereble ŝi aŭdigos sin en la Universala Kongreso en Mainz.

La melodioj estas belaj, precipe la refreno de "En blu", farbita je blu", kaj laŭ s-ro M. "furoras" en Italujo, do verŝajne baldaŭ estos popularaj ankaŭ en aliaj landoj. Ĉu ne estus eble aldoni la bonan Esperanto-tradukon al ĉiu nacia teksto?

Bona okazo disvastigi la Esperanto-tekstojn.

S. S. de JONG.

## Esperanto-radio-kursoj

Pluraj radio-stacioj diverslandaj dissendas komencan Esperanto-kurson. Tia kurso estas multefika, ĉar ĝi atingas gelernemulojn en la plej izolitaj lokoj, kie estus malfacile aŭ tute ne-eble aranĝi parolan kurson, kaj ofte en cirkonstancoj, kiuj kontraŭvole donas abundon da libera tempo. Mi pensas pri blinduloj, kripluloj, malsanuloj en hejmaj aŭ resanigejaj ĉambroj. Ankaŭ mi mem lernis la elementan scion pri Esperanto dum longdaŭra kuŝado en la lito per radio-kurso kaj mi ankoraŭ havas dankajn sentojn al s-ro P. Heilker, la gvidinto de tiu kurso, pro liaj instruado kaj saĝa instigado, kiuj fideligis min por ĉiam.

## LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1958

Stato je la 30-a de aprilo 1958

### Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Germanujo	6865	6376	92.88
2.	Nederlando	5567	4869	87.46
3.	Britujo	6963	5798	83.27
4.	Brazilo	7011	5699	81.27
5.	Svedujo	6945	5640	81.21
6.	Belglando	2185	1630	74.60
7.	Svisujo	1907	1390	72.89
8.	Usono	3225	2350	72.87
9.	Francujo	7647	5571	72.85
10.	Hispanujo	2508	1680	66.98
11.	Finnlando	2765	1835	66.36
12.	Danlando	2743	1745	63.62
13.	Norvegujo	2144	1225	57.14
14.	Pollando	6150	3435	55.85
15.	Jugoslavio	3800	1970	51.84
16.	Italujo	4030	1900	47.15

### Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Aŭstralio	1228	1230	100.16
2.	Izraelo	240	240	100.—
3.	Kanado	440	415	94.32
4.	Portugalujo	560	495	88.40
5.	Sudafriko	235	200	85.11
6.	Islando	315	260	82.54
7.	Japanujo	1280	1055	82.42
8.	Norvegio	955	725	75.92
9.	Aŭstrio	1505	910	60.46
10.	Urugvaj	414	245	59.18
11.	Maroko	659	355	53.87
12.	Argentino	1005	235	23.38



# Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.  
\*) ricevebla ĉe U.E.A.

**JOZEFO** de J. D. Applebaum.\* *Drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo, bazita sur la biblia rakonto. Prezento de Reto Rossetti, STAFETO, Bel-literatura Eldonserio 10, J. Régulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj. 120 p. 66 x 22.5 cm. 1.00 us.dol. (14.3 steloj).*

STAFETO, la elstare kuraĝa kaj literature altnivela eldonprojekto de sola individuo, Juan Régulo Pérez, kelkrilate ricevis la subtenon kiun ĝi ek de la komenco meritis. Du volumoj jam elĉerpiĝis. La entrepreno meritas eĉ pli grandskalan subtenon: Akademiano Régulo Pérez oferis, riskis, agadis pro la Esperanta literaturo pli ol oni rajtus postuli de eĉ la plej fervora Esperantisto. Lia eldonejo estas ne nur valoro provizejo de belaj verkoj, sed steleca morala ekzemplo al ni ĉiuj. Kaj ju pli rapide la nunaj libroj disvendiĝos, des pli frue tiu sinoferema, arda artamanto povos prezenti al la Esperantistaro la eldonotaĵojn, kiuj jam staras en impona viclinio antaŭ la presmaŝinoj.

La deka libro, *Jozefo* de J. D. Applebaum, estas drama poemo. Originalaj dramoj tre malabundas en nia literaturo; kaj ni tre bezonas ilin, ne nur pro la literatura valoro, sed ĉar bonaj dramoj ofte provizas la plej utilan legmaterialon por grupoj kaj progresaj kursoj. La dramo de s-ro Applebaum estas verkita ĉefe per tre glataj, oreplacaj, nature fluantaj heksametroj, kun kelkaj lirikstrofaj kantoj. La lingvo estas tre klara, fontakve freŝa kaj simpla kaj tute zamenhofa; jen beletra verko kiu taŭgus ankaŭ por progresema lernanto. Mi rimarkis nur unu vorton, *gerefo*, kiu laŭ mia opinio bezonas glosan.

S-ro Applebaum rerakontas en sia drama poemo la historion de Jozefo, troveblan en *Genezo*. Li ŝajne celis dramon poemon pli ol poezian dramon; lia elekto de epizodoj iom surprizis min. Li montras sur sia scenejo: kiel la nekomprenemaj, jaluzaj fratoj atakis Jozefon, ĵetis lin en puton, poste vendis lin al Mibsam, ismaelido; kiel Jozefo tre delikate eksvatis Asnat; kiel, en malliberejo pro falsa akuzo, li interpretis la sonĝojn de la ĉefvinisto kaj ĉefbakisto; kiel li poste, interpretinte faraonan sonĝon, promociiĝis al la plej alta posteno kaj finfine povis edzinigi Asnat; kaj kiel la patro Jakob vizitis lin en Egiptujo kaj tie mortis.

S-ro Applebaum tiel rezignis pri la plej dramecaj partoj de la *Genezo*.

La malĉasta edzino de Potifaro ne aperas; ŝia ampostulado kaj falsa akuzo montriĝas nur alude. Kaj per la nuna drama poemo ni ekscius nenion ajn pri la eventoplena rerenkontiĝo de Jozefo kaj liaj fratoj. Fakte, kompare kun la biblia rakonto, la dramo de s-ro Applebaum estas surprize senmova kaj senkonflikta!

Legante la dramon, mi sentas kvazaŭ mi ĉeestus ian gravan, signifoplenan riron de religio, kiu estas ne la mia. Etikaj paroladoj abundas; oftas simbolaj gestoj, kiuj nepre efikus tre bele sur scenejo. Eble erare — kiu povus certi? — mi sentas la dramon kiel kortuŝan memorigan riron pri la hebrea popolo: en ĝi troviĝas tragika priskribo de la hebrea destino (pp. 96—97); sed tra la tuta dramo troviĝas la temoj de ekzilo, Diservado, familia lojaleco kaj morala konscio. Por mi *Jozefo* ŝajnas inda histori-imagopova bildo pri kulturo, nun arkaika, sed testamentinta al la homaro multon valoran.

Tiu mia eble tro subjektiva interpreto ne signifas, ke homoj kaj homaj agoj mankas en tiu ĉi pionira dramverko. La amidilio de Jozefo kaj Asnat estas rave delikata. La filoj de Jakobo ĵa havas variajn temperamentojn; en Simeon s-ro Applebaum forte portretas jaluzveneniĝon per kelkaj nigraj linioj; kaj humaneco interese miksiĝas kun malforteco en Ruben. S-ro Applebaum tute kreis la karakteron de Asnat kaj la kontrastajn karakterojn de la ĉefvinisto kaj la ĉefbakisto. Li ankaŭ kreis ĉarman komikulon, la fremdan Gamodo'n, kiu, en Esperanto, parolas kun amuza „fremda akcento“ kaj laŭ tre individua stilo.

Mi kredas, ke tiu ĉi dramo bele impresus en teatro; muziko por la kantoj estas havebla, kvankam bedaŭrinde ĝi ne povis aperi en la libro. Sperta dirigisoro kun la aparatoj de modernaj teatroj povus prezenti la dramon kiel veran belan kaj kortuŝan spektaklon. La sceno estas kutime mallongaj, eĉ tre mallongaj; la scensanĝoj postulus specialajn rimedojn; sed solvo ne estus malfacila, precipe sur scenejo kiu havis la necesajn rimedojn. Mi esperas, ke baldaŭ tiu Esperanta trupo kuraĝos prezenti la dramon. Kiel diras Reto Rossetti: „La dramo de Jozefo samtempe estas homsiniganta kaj homiganta. Ĝi estas eĉ pli bona ol la ĉefvinisto kaj ĉefbakisto, ĉar ĝi enhavas kelkajn notojn. Legante kiu ne bone konas *Genezon* bezonus kelkajn klarigojn — ekzemple, pri la malliberigo de Jozefo kaj la veno de

Jakobo en Egiptujon. Mi mem edukiĝis kun la Biblio kiel edukcentra libro; jes, sed Esperanto nun ekfloras en Ĉinujo, Hindujo, Indonezio, Vietnamo, Nepalo, kaj internacilingva libro celas internacian publikon, inter kiu multaj ne konas la biblian fonton. Mi mem sentas la bezonon de unu klarigo: laŭ la Esperanta traduko de Genezo (kaj la angla) la tentantino de Jozefo estis la edzino de „Potifaro, kortegano de Faraono, estro de la korpogardistoj...“ kaj mastro de Jozefo, sed Asnat, edzino de Jozefo, estis la filino de „Potifera, pastro el On.“ Se mi ne miskomprenas la tekston, s-ro Applebaum unuigas la du gravajn egiptojn; li estas klerulo kiu scipovas la hebrea, sed noto ŝajnas al mi dezirinda.

Kiel ĉiuj STAFETO-libroj, Jozefo estas fizike tre bela libro, kun larĝaj margenoj kaj plaĉa tipografio. Preseraroj estas vere malmultaj, kaj, se ni devas akcepti homan eraremon kiel neeviteblan en la presarto, „for de mi... vi bardaĉoj...“ anstataŭ „birdaĉoj“ estas eraro por kolektanto. *Absit omen!* la bardoj restu bonvenaj ĉe la brava STAFETO!

Marjorie Boulton

DE JAPANAJ STUDENTOJ.\* Eld.

*Japana Esperanta Libro-Kooperativo, Ossaka. 1957. 40 p. 18 x 12.6. Prezo 0.25 us. dol. (3.5 steloj).*

El konciza kronologio ni ekscias pri la kreiĝo de la Tutjapana Generala Federacio de Studentaj Aŭtonomumoj (1948) kaj ties aliĝo al la Internacia Unio Studenta. Tiam komenciĝis organizita laboro, de granda politika signifo. Ĝi estas karakterizata per la rezisto kontraŭ la usonaj militbazoj en Japanio kaj kontraŭ la revivigo de la landaj reakciaj potencoj. La kulmina punkto de tiu ĉi agado estis pasiva, sed obstina batalado kontraŭ la plivasigo de la aerobazo en Sunagawa. La kampanjon partoprenis pluraj dekmiloj da studentoj kaj pli ol 200 el ili estis vunditaj per bruta interveno de armitaj policanoj; sed finfine la registaro cedis sub la premo de la unuanima indigno de la tuta popolo. La streĉa batalado kontraŭ la batalado kaj la kortuŝa decidoj kaj intensan bataladecon de la rezistantoj sugeste priskribas letero de unu el la partoprenintoj.

Universitata profesoro traktas la problemon de la „grandaj kaj malgrandaj ŝtatoj“, el la vidpunkto de la egiptaj kaj hungaraj aferoj en la jaro 1956 kaj de la protestmovado kontraŭ la nukleaj eksperimentoj. Li, modifante la konatajn vortojn de J. P. Sartre, proklamas: „Kiuj ne protestis kontraŭ Sunagawa afero, tiuj ne rajtas protesti kontraŭ la hungara afero“. Sed samtempe li konstataj: „Mi aŭdis, ke ankaŭ eŭropanoj mem kontraŭstaras la eksperimentojn de la H-bomboj, ĉar tamen ne deziras aŭdi tion el la buŝoj de japanoj. Do, ni devas ordigi niajn proprajn problemojn kaj purigi niajn proprajn manojn, antaŭ ol ni traktas eksterlandajn aferojn.“

Interesa estas kontribuajo de kristana studentino, kiu ilustras la konfuzon, rezaktan en pli multaj cerboj, ol estas tiuj de studenta junularo: „La studentoj pene studas kaj esploras la aktualan ekziston kaj ĝian signifon kiel plej profundan esencon de la homo. Ion plej profundan ĉiu el ili serioze serĉas en Marx aŭ Sartre aŭ en Kristo, luktante kontraŭ si mem, por ke ili ne dronigu sin en nihilismo.“ La aŭtorino volas trovi sian vojon en la praktikado de la doktrino de Kristo pri la amo al la najbaroj; sed ne en sentimentala memkontento, kiu kondukas nin al indiferento kontraŭ la socio.

En la broŝuron estas envicigita ankaŭ letero de japana studento al afrika amiko, kiu estis partopreninta la Internacian Studentan Seminarion en Kobe 1956; ilia amikeco donas al ili reciprokan kuraĝigon en la perspektivo de la batalo de l' aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ la koloniismo.

Tre konvinke pledas por esperanta korespondado de la studentoj la artikolo „La signifo de la korespondado“. Sub la nunaj kondiĉoj, kiam la vojaĝado eksterlanden estas ekstreme limigita, prezentigas en la perletera interŝanĝado de la opinioj grava rimedo por interkonatiĝo de la junaj homoj. La broŝuro alvokas studentajn amikojn de la tuta mondo, interŝanĝi opiniojn, ideojn kaj spertojn kun la japanaj studentoj (Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj, Nakatu Hamadōri 2-20, Ooyodo-ku, Osaka).

Estas grave ekkoni la ideojn, kiuj maltrankviligas la junularon de la japanaj lernejoj, kies abiturientoj post nemultaj jaroj influos kaj gvidos la sorton de la Ekstrema Oriento.

Prof. Svetislav S. Petrović: **SONET-KRONO POR LA ESPERANTIST-ARO\*** okaze de la 70-jara jubileo de Esperanto, julio 1957. Eldonis Serbia Esperanto-Ligo, Terazija 42, Beograd, Jugoslavio, kiel sian 6-an numeron de la serio Nova Libro. Prezo 0,65 gld; 2,60 steloj.

Pensojn pri la aŭtoro de Esperanto, pri etoso de tiama tempo, pri homarismo kaj problemoj aktualaj: Unesko-rezolucio, universala amo, pacifismo, kunplektis sprite la aŭtoro en 15 sonetojn. La lasta verso de ĉiu soneto estas samtekste unua verso de la sekvanta soneto kaj ĉiuj 14 komencaj versoj formas la dekkvinan t.n. Majstran soneton, do analogie, kiel ni ekkonis en la majstrajo „Kronplekto da sonetoj“ de la elstara ĉeĥa poeto Jaroslav Seifert, kies traduko aperis lastjare en Norda Prismo. Svetislav S. Petrović ankoraŭ ordigis la komencajn literojn de ĉiuj versoj tiel, ke ili formas simbolajn frazojn. Se oni ne faras severan juĝon pri la artisma valoro de la prozeca pensesprimado en sobraj poezimankaj versoj, kaj pri tie kaj tie lamanta ritmo aŭ rima malrareco kun kelkaj adasismoj, la verketo prezentos plezuron al ĉiu leganto. La lingvo estas korekta kaj ne enestas preseraroj, por kiuj estu danko al redaktinto Antonioj Sekelj.

Jiri Korinek

AMARA PANO\* de Joszef Darvas. El la hungara tradukis Ladislao Somlai. Eldonis Libro Servo de Dana Laborista Esperanto-Asocio. Kontrolita de la Literaturo Komitato de SAT. 112 paĝoj, kartonita kovrilo. Prezo d. kr. 7.— aŭ 1 dolaro us. (14 steloj).

Per absorba maniero rakontas al ni la aŭtoro pri la malplezura vivo de agrista helpanto en la antaŭmilita Hungarujo. Eble ekmiros kun mi multaj legantoj en landoj kun pli alta vivnivelo, precipe okcident- aŭ nordeŭropaj, pri la mizera vivo de terkulturistaj laboristoj en Hungario kaj aliaj orienteŭropaj landoj antaŭ la milito. Pano amara vere estis la vivbatalo kaj vegetado de tiaj povuloj. La romano kondukas nin naturalisme tra unu el dekoj da tiaj, unu al alia ov-similaj, jaroj. Ekde la jara dungigo je la Epifanio ĝis jarfina Silvestro ni mordas kun la junulo Aleksandro la duran ŝvite akiratan panon de la senrajtuloj, kiuj iurilate eksajnas al ni eĉ subrangaj al la iamaj servutuloj. Draste skuaj estas pluraj lokoj emfazantaj, ke agristaj helpantoj estis objektoj malpli valoraj ol bestoj. Tiel misakuso de bovido minacis la vivon de stalservisto per la forkego de kolereganta mastro. Tamen la rakonto trahelas la amo de virino kaj momentoj de infanaskigo ĉe la malriĉuloj ne malpli kortuŝaj.

Koncedante, ke alarmi la homajn konsciencojn kontraŭ ĉiu maljusto, ekspluatado kaj arbitra orgojlo de la povhavuloj estas ĉiam aktuale kaj prave, mi tamen volus rimarkigi, ke la literaturo bona verko prezentas bildaron iom blankan-nigran, laŭ bezono de sia klasbatala tendenco.

La traduko de Ladislao Somlai estas tre bona, preseraroj estas nemultaj. Sur p. 69 mi preferus en frazo „kvazaŭ mi estas grava persono“ kondicionalon, same aliloke en frazo „kvazaŭ mi dormas“. Sur p. 99 pli bonus: mi jam finis la manĝigon, trinkigon de la bestoj (anst. manĝon, trinkon).

La bona libro trovos certe plaĉon ĉe multaj legantoj kaj mi povas ĝin sincere rekomendi.

Jiri Korinek

NI LEGAS BILDOJN\* (Instrua bildlibro) de W. S. Gray; A. S. Artley, M. Monroe; ilustraĵoj de Ruth Steed; gvidlibro donita por esperantaj infanoj de R. ... laŭ la angla „We read pictures“. 1° unu bildalbumo 47 p. 25 x 31 cm., 0,70 kanada dolaro aŭ 10 steloj; 2° Unu Gvidlibro, 37 p. 20,5 x 14,5 cm., 0,42 kanada dolaro aŭ 6 steloj. Haveblaj ĉe Esperanto Press Oakville, Ont. Kanado.

La libro estas nek Esperanto-lernolibro, nek poriranta gvidlibro. Ĝi estas de la sama tipo kiel infanoj tuj atingontaj de la aŭtoro. La ĉefa parto se la teksto kompreneble la albumo, kiu enhavas nur bildojn. Duono de ĉiuj bildoj estas koloraj kaj sugestas rakontojn facile atingebajn de infanetaj mensoj; la cetera parto konsistas el nigraj

desegnaĵoj, kiuj liveras oportunan materialon por pedagogiaj ekzercoj: kutimiĝo al la ĝusta legadodirekto, observado de etaj detaloj, nomado de objektoj aŭ agoj, kompletigo de desegnaĵoj, instigo al korekta frazfarado, k.s. La bildoj estas plaĉaj, naturaj, vivplenaj kaj ofte spritaj; ili enscenigas la samajn rolojn (infanojn, bestojn, ktp.) en plej diversaj cirkonstancoj. Nur unu etan bedaŭron ni povas esprimi: ĝi koncernas la eksteran aspekton de la libro, kiun ni preferus, en nia epoko, kiam oni tiom atente prizorgadas la porinfanan eldonadon, pli fortika kaj kun lakita kovrilo.

La gvidlibro, destinita al la gepatroj kaj instruistoj, klarigas la metodon, laŭ kiu oni uzu la albumon. La tekniko estas tiu uzata ĝenerale en la modernaj infanĝardenoj; sed la klarigoj estas sufiĉe simplaj kaj detalaj tiel, ke eĉ la gepatroj sen specialaj psikopedagogiaj konoj povas utiliĝi ilin. La kajero estas simpla sed sufiĉe klare presita. Ni notis nur malmultajn preserarojn: p. 191.10: „certigu“ (kie devus esti: certigu); p. 9 l. 19: „sur“ (kie devus esti: sub); p. 11 l. 4 de malsupre: „paroj“ (partoj); p. 12 l. 2 de malsupre: „strangajo“ (strangaĵo).

Nun ni konsideru la adaptajn laŭ lingva vidpunkto. Ni tuj precizigu, ke ni ne havis okazon legi la originalon; sed tio eble ne estas grava, kiam temas pri „adaptajo“. La teksto estas ĝenerale bona; ni tamen esprimos kelkajn rezervojn konsiderante, ke ĝi povas influi la manieron, laŭ kiu oni parolos nian lingvon al niaj infanoj. (A) Gramatiko: la senakuzativigo de epiteta participo sonas iom ne ĝuste kaj nekonforme al la Zamenhofa uzado (F.K. pp. 48, 57): „la gutetantan Fulmon elrampanta“, p. 15, „frazojn priskribantaj“ (p. 16), „patron pendiganta kaj martelanta“, „patron uzanta“ (p. 25), „ludilon montrita“ (p. 36), „poŝtiston disportanta“ (p. 37); en tiuj kazoj la participoj ne indikas staton rezultantan el la juĝo de la aŭtoro: ili certe estas epitetoj kaj devas esti en akordo kun la substantivo.

La verbotempoj foje ne estas ĝuste uzataj speciale post „kiam“: „estas instigataj“ (p. 1 l. 7), „Kiam vi trovas, vi vidos“ (p. 20) „Kiam estas“ (p. 36); en tiuj lokoj oni devus uzi la verbon en futuro, forskuante la influon de la originala lingvo; en alia loko (p. 8): „eble vi estus ridinta, eĉ se Fulmo ne faris ĝuste...“ eble devus esti „farus“ aŭ „estus farinta“; en aliaj lokoj (pp. 9 kaj 11) oni trovas „kiajn“ (kiajn kolorojn, kiajn objektojn), kie la senco postulas „kiujn“: al „kia“ respondas speco, kategorio (hela, tranĉa), dum al „kiu“ respondas precizigo (verda, blua).

Aliaj eraretoj estas: „nomi kelkajn de“ (anstataŭ el, p. 22); „al kelkaj“ (anstataŭ por kelkaj, p. 23 l. 4); „antaŭ iu povas haltigi lin“ (anst. antaŭ ol... p. 23). (B) vortaro: „doni la manon“ parolante pri hundo sonas iom strange; oni legas „imagon“ anst. „bildon“ (pp. 13, 15); „keston“ (anst. fakon, p. 10); „rimeno“ (p. 9) ne taŭgas por knabina vestaĵo. kaj tie devus esti „ŝelk-

eto"; „rulŝui" (p. 20) sonas false, ne-logike. Aliparte, parolante pri familiaraj bestoj kaj uzante por ili la pronomon „ŝi", oni tute ne komprenas kial la tradukinto uzis la vorton „kato" (pp. 64), kaj „bovo" (pp. 30, 35) dum la kutima lingvo postulas „katino, bovino". „prenis al la laĝeto" (p. 16); preferinde „kunprenis, kunportis...". Kvankam ni principe ne kontraŭstaras la novaĵojn: „povas diri" (p. 22) „preniris" (p. 24), ni preferus en tia libro formojn pli analizajn.

En la antaŭparolo presita sur la albumo ni trovas: „Ni legas bildojn de-segnitaj" kaj „defii" (anst. stimuli). Fine du paĝoj de la albumo (32 kaj 33) rilatas al anglaj „infanversoj". Verŝajne anglalingvaj infanoj tuj rekonas tiujn rakontojn, sed same ne estas pri ceteraj landoj, kaj oni demandis sin, kial la adaptinto ne donis en sia gvidlibro almenaŭ resumon pri tiuj „infanversoj".

En la penso de eldoninto kaj tradukinto la verko povas utili por denaskaj esperantistoj kaj, pro tio ke la albumo enhavas nur bildojn, ĝi povas esti uzata en kiu ajn nacia lingvo. Tiurilate ĝi povas esti rigardata kiel nereakta, sed grava kontribuado de Esperanto al la disvastigo de instruaj procedoj. Ni opinias, ke oni ankaŭ povas utiligi la libron por pli grandaj infanoj kun la celo paroligi ilin en Esperanto. Ni sincere gratulas la iniciatintojn; kaj esperas, ke la sukceso de la afero estos tia, ke ili baldaŭ eldonos sammaniere la du ceterajn verkojn, kiuj apartenas al la sama serio kaj enscenigas la samajn estaĵojn.

R. kaj J. Gonin

## La Lingva Flaoso

Oni atentigis pri la fakto, ke informaj dokumentoj submetitaj al la Plenumkomitato ĝenerale ne estis en ĉiuj laborlingvoj de la komitato, diris la Direktoro Ĝenerala ĉe lastatempa kunveno de la komitato.

„Tio estas vera, ĉar tiaj dokumentoj estas pretigitaj rapide, responde al in-formpeto de la Plenumkomitato kaj, se ili estus tradukitaj en la aliajn tri laborlingvojn, tio devus okazi je kosto de dokumentoj sur la tagordo de la komitato," li diris.

Informaj dokumentoj povus, kompreneble, esti tradukitaj en la laborlingvojn de la komitato se la oficistaro estus pli multnombra, sed ĝis nun la Sekretariato klopodis funkcii kun minimuma nombro da tradukistoj.

„Ekzistas tendenco al pli da dokumentoj en la angla ol la franca. La raporto de fakuloj, ekzemple, estas ordinare skribitaj de personoj, kies unua lingvo estas la angla, kaj ili ne estas tradukitaj, sed estas multobligitaj kaj disvastigitaj en la originala lingvo," li diris.

Plue, la granda plimulto de la dokumentoj de UNO estis en la angla, tial ke tiu organizaĵo havas sian sidejon en anglalingva lando.

„Estus neeble venki tiun senintencan lingvan tendencan, krom se UNESKO akceptus la grandajn kostojn por propra tradukado de ĉiuj dokumentoj," li diris.

La DG certigis al la anoj de la komitato, ke neniu klopodo estas farata en la Sekretariato diskriminacii inter lingvoj. Oni petis, ke stabanoj verku aŭ en la franca aŭ en la angla, nome en tiu el la du lingvoj, kiun ili trovas pli facila.

el unseco house news

Okaze de la Ekspozicio  
de Bruselo 1958 . . .

## Kreo de Internacia premio de la perioda Gazetaro

Laŭ propono de sia Prezidanto S-ro Arthus DESGUIN, la Administrantaro de la Asocio de Belgaj kaj Eksterlandaj Periodaj Journalistoj decidis la kreon de „Internacia Premio de la Perioda Gazetaro".

Tiu ĉi premio valoros dek mil belgajn frankojn kaj rekompencos, unuafoje en tiu ĉi jaro, la aŭtoron de la plej bona artikolo, aperinta en la perioda gazetaro kaj kiu, iamaniere, pritemos la Ekspozicion Universalan kaj Internacian de Bruselo 1958.

La tekstoj, kiuj enhavas maksimume du mil vortojn, povos esti aperintaj en franca, nederlanda, germana, angla, hispana aŭ itala lingvo.

Krome, kaj laŭ propono de S-ro Georges-Marie MATTHIJS, Sekretario de la A.B.E.P.Ĵ., ankaŭ la internacia lingvo ESPERANTO estis akceptata pro la konsidero ke ĝi estas ankaŭ uzata de la Ĝenerala Komisararo de la Belga Registaro de la Ekspozicio.

La ensendaĵoj, devige sendotaj per poŝta rekomendigo, devos alveni, plej laste la 30an de junio 1958a, ĉe la Sekretario de la Juĝantaro, Georges-Marie MATTHIJS, 52, avenue Emile Max, BRUSELO IV (Belgujo), kiu sendos kompletan regularon al ĉiuj petintoj.

## ALVOKO

al ĉiuj esperantistoj kiuj povas kapti la radio-stacion

HILVERSUM - NEDERLANDO

Planata estas, okaze de la Zamenhofa Jaro, populara literatura radio-kurso en Esperanto, gvidota de eminenta esperantisto - universitata do-cento. Partopreno ebla en ĉiuj landoj. Kotizo fikso, sed kiel eble plej malalta. Ĉiu partoprenonto ricevos ĝustatempe antaŭ la komenco la traktotajn tekstojn. Multaj partoprenantoj el eksterlando helpos al la homsinifera plano. Interesitoj skribu al pli bona kribinto, sekr. de la prepa. Esperanto

J. CALADO,  
Vergeet-mij-nietstraat 29 b,  
Rotterdam - 12, Nederlando

## ESPERANTISTA VIVO

### Naskiĝoj

**Faux.** Je 14.1.58 al Margaret kaj Derrick Faux, ĉe Wheathill Bruderhof, Bromdon, Bridgnorth, Anglujo, naskiĝis filino Hilary Alise, fratino por Joy kaj Daniel.

**Hohl.** Naskiĝis filineto Agnes al ges. J. Hohl en Flims, Svislando.

**Landenne-Wautier.** Al ges. Armand Landenne-Wautier en Ampsin, naskiĝis la 17an de februaro filino Dominique.

### Gefianĉigo

**Gacond-Giroud.** Gefianĉiĝis f-ino A. Giroud el La Chaux-de-Fonds kaj s-ro C. Gacond el La Sagne, Svislando, ambaŭ individuaj membroj de UEA.

### NEKROLOGO

**Bramkamp-Weber.** Fine de januaro mortis tute subite s-ino Bramkamp-Weber, D de UEA en Scheveningen, en aĝo de proksimume 73 jaroj.

**Cirera.** Ramon Cirera, 74-jara, mortis la 24an de januaro. Li estis FD de UEA en Barcelona.

**Csáder.** La 28 an de februaro en Bratislava forpasis 56-jara Aleksandro Csáder. Iom escepte ni presigas pri li nekrologan poemon, tiel ke Jiří Kofínek, kiu ĝin verkis, titolas ĝin „Al nekonata esperantisto", kaj ni opinias, ke ĝi povas havi ankaŭ pli ĝeneralan aplikon:

En lia kor' eklumis foje la ekkono  
kaj li al nobla sent' oferis kun sindono  
de sia vivo ĉiun el la tagoj  
ĝis tiu lasta de l'surteraj vagoj.

Li propagandis, instruadis, anojn  
varbis

kaj jam en revoj tutan mondon verda  
farbis,

kaj eĉ se foje li naivis iom:

Por bon' li luktis, celis harmonion.  
Al UEA fidele servis koresponde,  
simpla frontano, rekompencojn ne  
havonte,

li, nekonata kaj ne fame glora,  
kies ofero restos plej valora!

**Gaume** France el Moulins (Allier) Francujo mortis 76-jara la 1-an de februaro 1958. Li estis aŭtoro de „L'Esperanto facile", kurslibro eldonita en 1955.

**Kozma.** La 4an de januaro mortis 73-jara Johano Kozma, grekkatolika kano-niko, esperantisto de 1911, estinta redaktoro de „Katolika Mondo".

**Sayers.** S-ro James Denson Sayers, aĝo 69, mortis la 26an de decembro 1957 en Lillie, La., Usono. Li estis konata aŭtoro de libroj en la angla kaj Esperanto. Lia verko „Invito al ĉielo" havis vastan legantaron kaj en finna lingvo fariĝis tre konata. Li estis unu el la fondintoj de ELNA, la landa asocio aliĝinta al UEA en Usono.

**Schellberg.** S-ro Heinrich Schellberg el Köln-Buchforst mortis la 18an de decembro 1957 pro kor-apopleksio.



# LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,

Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

## ĜIS REVIDO EN HOMBURG



Karaj junaj gelegantoj, vi bone scias, ke la skriba kontaktilo reprezentata de ĉi tiu paĝo estas tre utila por la kuraĝigo de la junulara movado, sed vi certe ankaŭ konscias, ke skriba interrilatado ne sufiĉas, ke de internaciaj renkontiĝoj nia movado ekiras kun pli da forto kaj pli da entuziasmo. Tial, ĝuste en la periodo, kiam la ferioj iom haltigas nian agadon kaj ni volas ĝui merititan ripozon, la estraro de TEJO invitas vin al la 14-a internacia junulara kunveno en Homburg/Saar (Germanujo). Vi certe jam legis la allogan programon en la pasintaj jaroj de La Juna Vivo; multaj el vi certe ricevis la belajn aliĝindajn eldonitajn jam en marto (kaj se vi ne ricevis ilin, vi povas ilin peti de 14-a Internacia Junulara Kunveno de TEJO, Homburg/Saar, Germanujo). Multaj sencelaj junularoj partoprenis eble ankoraŭ ĉi tiu jaro. Vi konscias, ĉu partopreno en tiu aranĝo estas oportuna por ili. Sed mi povas certigi al vi, ke partopreno en internacia junulara kunveno estas utila al la gesamideanoj kiuj laboras por Esperanto, ĉar ili povas interŝanĝi siajn spertojn kaj akiri novajn ideojn por sia laboro, al la gejunuloj kiuj ŝatas amuziĝi, ĉar la distra programo estas speciale prizorgita, al la komencantoj, ĉar en pure esperantista medio ili povos pli facile finlerni la lingvon. Kaj mi mem, izole laboranta por la redaktado de ĉi tiu organo, deziras renkonti ĉiujn ĝiajn junajn legantojn, por kio nia interrilato iĝu pli viva kaj pli amika, kaj por ke La Juna Vivo ĉiam pli alformiĝu al viaj deziroj. Tial mi speciala sento mi diras al vi ĉi tiu Ĝis revido en Homburg!

Nicola Minnaja

## ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTA JUNULARO

Ceĥoslovaka esperantista junularo aranĝos ankaŭ nunjare Somerajn Esperanto-Tendarojn, al kiuj ĝi invitas ankaŭ la junularon el eksterlando:

6-19 julio: Junulara Esperanto-Seminario en verda valo de rivereto Moravice en norda Moravio. La instrua programo konsistos el prelegoj kaj diskutoj pri organizado, propagando, instruado, junulara laboro en kaj ekster la kunvenoj, pri edukaj problemoj, kulturprogramoj ktp. Ĝi estas destinita por aktivuloj en la junularaj grupoj. Loĝado sub tendoj.

6-19 julio: Junulara Esperanto-Kolegio apud valbaraĝo Slapy en regiono Praha. Lingvaj kursoj: elementa, daŭriga, konversacia, Loĝado en kabano.

20 julio-2 aŭgusto: Somera Esperanto-Tendaro ĉe Arĝenta golfo de valbaraĝo Vranov en suda Moravio. Kursoj: daŭriga, konversacia kaj porinstruista. Loĝado sub tendoj.

3-20 aŭgusto: La sama apud valbaraĝo Vranov kun la kursoj: elementa, daŭriga, konversacia, speciala porinfana.

En ĉiuj kolegioj oni instruos nur antaŭtagmeze; posttagmeza programo konsistos el ekskursoj, banado, boato, sportkonkursoj, ludoj k.s.; vespere bivakfajroj kun plejparte distra programo.

Informojn pri ĉiuj ĉi aranĝoj donas la sekretario: s-ro Vlastimil Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3 (Ĉeĥoslovakujo).

En la pasintaj jaroj vizitis niajn tendarojn gesamideanoj el Hungarujo,

Jugoslavio, Svedujo kaj Nederlando. Ni esperas, ke ankaŭ nunjare venos kaj guos nian amikan kuneston en naturo pluraj eksterĉeĥoslovakaj gejunuloj. Postulu la specialan prospekton kun aliĝilo de nia sekretario (adreso supre).

„Tagiĝo” estas dumonata gazeto de ĉeĥoslovaka esperantista junularo (en regiono Ostrava), abonebla per egalvalora esperantaĵo (12 ĉs. kronoj). Adreso: Jaroslav Kuzník, Opava, Mendlova 21 (Ĉeĥoslovakujo).

Ceĥoslovaka esperantista junularo havas sian fakon „Esperanto en lernejoj”, kiu deziras kontakti kun eksterlandaj lernejoj Esperanto-kursoj kaj rondetoj. Adreso: Oldřich Schwetter, Havířov I, blok 14/67 (Ĉeĥoslovakujo).

J. Werner.

## ESPERANTISTA JUNULARO EN MILANO (ITALUJO)

Unufoje aŭ dufoje monate, dum la vintro ĉefe, ni organizas promenadon aŭ ni aliĝas kune al promenado de alia organizaĵo. Tio montriĝis bona propagando, ĉar kelkaj geamikoj iĝis gesamideanoj sekve de festoj aŭ promenadoj. La afero estas ankaŭ utila laŭ financa vidpunkto, ĉar promenado de ni organizita riĉigas nin je kelkaj miloj da liroj.

Preskaŭ subite en januaro ni decidis malfermi kurson de Esperanto. La intereso vekita de niaj festoj estis sufiĉe granda kaj multaj gejunuloj esprimis intencon partopreni. Sed nur il aliĝis, malgraŭ nia promeso oferi al unu el la plej lertaj vojaĝon al Majenco okaze de la Universala Kongreso. Sed la malmultaj gekursanoj estas sufiĉe lertaj kaj sendube jam samideanoj. La partoprenado estas kontentiga kaj la pliparto montras intereson.

Ni projekcios diapozitivojn per nia lumbildaparato (kiel ni jam faris kelkfoje la lastan jaron, konigante bildojn pri Nederlando de du el ni vizitita kaj pri monto Rosa traeks-



Homburg, bela urbo de 14-a J.K.

kursita de nia amiko). La temo de la diapozitivaj povas esti varia: la gravo estas, ke oni klarigas ilin Esperante.

Por informi vin plene pri ni, ni aldonas, ke en nia sekcio ni funkciigas trinkejon, kiu permesas al ni enspezi tiun monon, kiun ni elspezos sendube inteligente (per aĉeto de lumbildaparato, vojaĝo al Majenco por kur-sano). Sur nia mura ĵurnalo ni aperigas niajn anoncetojn kaj la korespondajn petojn de niaj eksterlandaj geamikoj, sed precipe ni afiŝas artikolojn kaj informojn pri Esperanto aperintajn en ĵurnaloj kaj ni invitas, instigas niajn anojn respondi. Ni konsilas ĝentilecon kaj takton, sed firmecon en la respondoj al niaj kontraŭuloj.

La Estraro de Milana Esperantista Junularo

## KONKURSOJ POR LA JUNULARO

En junio okazos en Francujo tri konkursoj por la ĝejnuloj ne pli ol 16-jaraj. Unu estos organizita de Federacio Languedoc-Roussillon (suda regiono de Francujo); alia, de Norda Federacio; kaj la tria, de la Grupo de Bourg-la-Reine (pariza regiono).

Sume 82000 fr. fr. estos disdonitaj kiel premioj.

Ciu el tiuj konkursoj konsistos el du provoj: unu elimina provo skriba kaj anonima, unu fina provo parola kaj publika. En tiu lasta provo partoprenos nur la dek plej bonaj kandidatoj elektitaj per la skriba provo.

D-ro G. Maillard

## LABOR-KAMPOJ INTERNACIAJ DUM 1958-a

En Pollando, dum tuta aŭgusto, certe okazos labor-kampo celanta la konstruon de vojo, kaj eble estos dua projekto. Je la fino de marto jam aliĝis 27 gevolontuloj, sed oni antaŭvidas, ke ne ĉiuj povos alveni pro malhelpaĵoj pri vizoj ktp.

Mi ĵus renkontis la internacian sekretarion el Parizo, kiu mem estas esperantisto. Li firme avertas, ke Internacia Civila Servo ne volas enkonduki Esperanton, ke oni nepre ne trudu la lingvon, sed ĝin utiligu kiel praktikan rimedon por varbi gevolontulojn kaj organizi labor-kampojn. Al tio mi volas aldoni, ke oni ne provu instrui nian lingvon en tiu ĉi medio, krom se amiko petus privatan kurseton. Ĉiam mankas tempo por lingvistado, kaj tiuj, kiuj ekinteresiĝas, facile lernas Esperanton dum la sekvanta vintro.

Rimarku, ke oni jam aranĝas labor-kampojn en deko da landoj. Ciu junul(in)o respondecas pri la propra vojaĝokosto, sed ricevas manĝaĵon senpage dum oni restas ĉe la labor-grupo, ordinare dum ĉu semajnoj aŭ pli laŭeble. Ĉu eble vi povas organizi projekton en via loko? Aparte planas post katastrofo, se venos ĝi, tempe

dekoj da ĝejnuloj pretaj fari la urĝan laboron.

Vidu ankaŭ la februaran numeron kaj petu prospekton ĉe Service Civil International, 77 Bd. Jean Jaures, Clichy (Seine; Francujo).

T. Woodall

## Moskva junulara Esperanto-Grupo „Fajrero”

Nia grupo verŝajne ne distingigas de aliaj Esperanto-grupoj en diversaj urboj de nia vasta lando. Samkiel ĉie, ni studas la lingvon kaj propagandas ĝin, ni aranĝas amuzvesperojn, ni renkontigas kun eksterlandaj gastoj; sed estas difinitaj detaloj karakterizantaj nian grupon: unue, la geografia situo mem de nia grupo metas ĝin en centron de Sovetia Esperanto-movado kaj sekve havigas al ni la specialan respondecon; due, nia grupo estas la ido de la 6-a Festivalo, kaj partoprenintoj de la 6-a Festivalo praktike komprenis la altan valoron de la lingvo, do ili scias, por kio ili laboras.

M. Gipsling,

prezidanto de „Fajrero”

## MALLONGAJ INFORMOJ

Maroka Esperanto-Asocio fondis junularan sekcion sub la nomo Maroka Esperanto-Junular-Asocio. La estraro de MEJA konsistas el: Lucien Piétri, 15 place Collet, Meknes (prezidanto), Henri Rousseau, Ministère des Travaux Publics, Bât. III, Rabat (viceprezidanto), Jean Gourdon, 31 rue de Dakar, Meknes (sekretario), Jeanne Grimaud, institutrice, 21 Brd. de Paris, Meknes (kasisto), Jilali Fakir, instituteur, Ecole de la Nouvelle Médina, Kenitra (asesoro).

Skota Federacio Esperantista, filiigita federacio de Brita Esperantista Asocio, nomis kiel komisiiton pri junularaj aferoj Hugh Martin, Lilybank Cottage, Glenshee Street, Glasgow E 1.

Brazila Esperanto-Ligo fondis junularan sekcion sub la nomo TEJO en Brazilo. Ĝia estraro konsistas el: Mauricio Monken Gomes (prezidanto), Claudio Raymundo de Siqueira Spinelli (viceprezidanto), Iolanda da Silveira Soares (sekretario), Alayde de Souza (kasisto). La adreso de TEJO en Brazilo estas ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Praça da Republica 54-1ª, Rio de Janeiro.

La 31-an de marto okazis en Budapeŝto konferenco de la Budapeŝta Esperantista Junularo.

Reĝa Belga Ligo Esperantista nomis kiel komisiiton pri junularaj aferoj Robert Lagast, Brickerweg 200, Ant-Kruis (Bruĝo), Belgio.

Unuiga Esperantista Asocio fondis junularan sekcion sub la nomo F. Esperanto-Junularo. Ĝia estraro konsistas el: Michel Duc Goninaz (prezidanto), Lucien Giloteaux kaj J.-P. Colnot (viceprezidantoj), Paul Ciliga (sekretario), Michel Audibert (kasisto),

Lucien Piétri, René Chareyre, f-ino Liech-Walter kaj eble aliaj. Jam la 7-an de decembro ĝia statutprojekto estis oficiale transdonita al UEF; ek de tiu dato la sekretario de FEJ partoprenas oficiale la kunvenojn de la Nacia Komitato de UEF.

La 15-an kaj 16-an de februaro okazis en Brno junulara labor-konferenco kaj la tradicia esperantista maskobalo en la kadro de Esperanto-seminario; partoprenis gesamideanoj el ĉiuj regionoj de Moravio, el pluraj regionoj Bohemiaj kaj el Slovakio. Sub prezido de Andreo Valjan, prezidanto de Esperanto-Junularo en Brno, oni diskutis pri la stato de la movado, pri la cirkulero „Tagiĝo”, pri la tendaroj kaj la kursoj. Oni elektis centran preparkomitaton por la someraj Esperanto-Tendaroj: prezidanto Jan Werner el Ostrava, sekretario Vlastimil Kočvara el Ostrava, zorganto pri instruado Vlastimil Novobilsky el Praha, zorgantoj pri teknikaj aferoj Josef Solncky el Opava, Karel Kraft el Obořiště kaj Pavel Sittauer el Třevič, zorgantoj pri programo kromkurso Andreo Valjan el Brno, Oldřich Schwetter el Havířov kaj Jan Slivka el Bratislava. Probable okazos junulara tendaro apud la Lago de la Paco, en Slovakio.

## Mondekspozicio Bruselo 1958

Okaze de la mondekspozicio multaj personoj serĉos vane loĝeblecon en Bruselo aŭ timas la altegajn prezojn en tiu urbo.

La Gentaj Esperantistoj havas la grandan plezuron konigi al la gesamideanoj de la diversaj landoj, ke ĉi aranĝas en GENT, tendaron praktikan kaj malmultekostan.

Loĝebleco estas por unuuloj, por familianoj kaj junulargrupo, ĉu tre favoraj prezoj, nome: Fr 65.— po persono en tendro; Fr 35.— en grup-tendo.

Fr 35.— po 15 Fr.— Tagmanĝo: de Fr 35.—

Por la personoj, kiuj ne havas propran tendron, la kostoj estas Fr 25.—

Ni altiras speciale vian atenton ke la prezoj por tranokti en tendro inkluzivas la uzadon de matraco, de lituko kaj de litkovrilo; plie oni disponas pri ege moderne instalitaj lavejoj.

GENT estas famkonata urbo, monumentriĉa kaj tre vizitinda. — Ĝi situas je 50 Km de Bruselo kaj ĉiutage aŭtobuso veturas tien kaj reen — Ankaŭ la vagonaro faras la veturadon en 35 minutoj!!

Ni nepre kalkulas je la Esperantistoj kaj precipe je la junulargrupoj, por ke ili multnombre anoncu sin je la tendaro: „MOTELTENTENKAMP — VERLOOVE SPORT” Gent, por pruvi al la vigeleco de nia Esperanto-movado tra la tuta mondo.

Tu Tendaro funkcios dum la tuta daŭro de la Mondekspozicio, tio estas: Dum 6 monatoj.

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de majo 1958.

N-ro 305

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aprilo kaj ankaŭ por komparo, je la fino de aprilo 1957:

	1957	1958
Asociaj membroj	6601	7773
Individuaj membroj		
MJ	662	587
MA	4807	4130
MS	600	477
Pat.	5	5
DM	303	302
HM	52	46
JMJ	11	10
JMA	79	78
	6519	5635
	13120	13408

## DELEGITOJ

**Aŭstralio**  
Perth D: vakas.

**Brazilo**  
Bauru (S. Paulo) FD (fotografio): vakas.

**Britujo**  
Beaconsfield (Buckingham) D: S-ro Thomas James Woodall, helpanto ĉe sp. ludoj, Ponds, Seer Green. FD (internaciaj laborkampoj): la D. Maidstone (Kent) D: S-ro David Gordon Hill, instruisto, "Windy Top", Barning Woods. FD (muziko): la D.

**Danlando**  
Svallerup (Vestsjælland) D: vakas.

**Helsinki** (Uudenmaan la.) D: vakas. FD (Kristanismo): vakas.

**Vammala** (Turun ja Porin lääni) D: S-ro Amos Kalliomaki, instruisto.

**Francujo**  
Aytre (Charente Maritime) FD (geografio): S-ro René Menu, trajn-oficisto, Cité Guillocheau, Chemin des Cottes Mailles.

**Cognac** (Charente) D: F-ino Monique Congé, infanvartistino, Rue de la Croix Montamette.

**Guéret** (Creuse) D: S-ro Jean Saugère, inĝeniero T.P.E.

**Saint Laurent de Brevedent** (Seine Maritime) D: S-ro Albert Edouard Letendre, profesoro pri lingvoj, "Les Genêts". FD (filatelo): la D.

**Tourcoing** (Nord) D: vakas.

**Hindujo**  
New Delhi (Uttar Pradesh) D: S-ro Veerendra Dwarkadas Adhiya, ĵurnalisto, "Prerna", Satnagar.

**Hungarujo**  
Budapest FD (ministaj aferoj): S-ro Gusztáv Csaszlava, mininĝeniero, Bajcsy Zsilinszly-út 19/a VI 4.

**Italujo**  
Como FD (instruistaj aferoj): vakas. Grosseto (Toscana) D: vakas.

**Japanujo**  
Itikawa (Tiba-ken) D: S-ro Yoshihiro Yasumura, virologiisto, Bokke 2-862. Osaka-si (Osaka-hu) VD: S-ro Sooichi Kojima, ŝtata oficisto, 1098, Rokumanji. FD (telegram-telefono): la VD. Tiba (Tiba-ken) FD (mikrobiologio): S-ro Yoshihiro Yasumura, virusologiisto, Bakteriologia Instituto, Medicina Fakultato, Tiba Universitato.

**Jugoslavio**  
Split (Dalmacija) FD (biologio): F-ino Tatjana Paitoni, profesorino, Istarska 14. FD (instruado): S-ro Kazimir Lučin, profesoro, Gajeva Ulica 3.

**Kolombio**  
Bogotá D: S-ro Jesus Antonio Velez Rojas, civila inĝeniero, apartado no 454.

**Kongo Belga**  
Elisabethville (Haut-Katanga): D: S-ro Pierre Paulus, kontregistro, B.P. 3282.

**Norvegujo**  
Frederikstad (Østfold) FD (artfotografado): S-ro Torstein Andersen, fotografisto, Risløkka 6, Glemmen. Oslo D: S-ro Arne Høgseth, disponento, Sjøgata 14.

**Sovet-Unio**  
Minsk (Bielarusio) D: S-ro Paŭlo Kirjušin, docento de pedagogia instituto, Krasnaja 16, kv. 20.

Minsk (Bielarusio) VD: S-ro Boris Cečetko, ekonomiisto, poŝkesto 33. Moskva: D: S-ro Ivan Sergejev, verkisto, str. de Levitan 1/40, loĝ. 196.

## Usono

St. Albans (West Virginia) D: S-ro Roland W. Ruff, ĉeflaboristo, 730 Holley Street.

## NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Addis, F-ino W. E., Flinders Park, Aŭstralio.  
Clavier, F-ino B., Caluire, Francujo.  
Gamble, S-ro J. H., Bethpage, U.S.  
Koppel, S-ino E., Reservoir, Aŭstr.  
Ribot, S-ro A., Marmande, Francujo.  
Silvestriev, S-ro Ilja, Kolarovgrad, Bulgarujo.

## MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1958

357 Burstin, S-ro S., Melbourne, Aŭstralio.  
358 Kosutek, S-ro Josef, Sydney, Aŭstralio.  
359 Meister, D-ro Oskar, Graz, Aŭstrujo.  
360 Boffejon, S-ro Hector, Brasschaet, Belgujo.  
361 De Boes, S-ro G., Gent, Belgujo.  
362 Radermecker, S-ro J., Bruxelles, Belgujo.  
363 Vandevelde, S-ino M., Gent, Belgujo.  
364 Araujo, S-ro Get. Soares de, Rio de Janeiro, Brazilo.  
365 Carvalho, S-ro A., Bebedouro, Brazilo.  
366 Costa, F-ino Yolanda de Araujo, Rio de Janeiro, Brazilo.  
367 Coutinho, S-ro Antônio Caetano, Rio de Janeiro, Brazilo.  
368 Farias, S-ro Benedito Fig., Feira de Santana, Brazilo.  
369 Fóscolo, D-ro Hugo, Pompeu, Brazilo.  
370 Gama, S-ro Joao de Oliveira, Juiz

## KONKURSO DE MEMBRO-SUBTENANTOJ

Nova gajninto de libropremio en valoro de 10.— gld estas S-ro S. Burstin, en Melbourne, Aŭstralio, kiu registriĝis sub no. 357 kaj kiun indikis la bona sorto en la konkurso de la kvara cento. S-ro Burstin estas individua membro ekde 1954 kaj jam de tri jaroj subtenas la Asocion kiel S-ro Koran gratulon al li. Oni sekvu la programon!

## FONDAJO-ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 1131.67 gld.  
Novaj kontribuoj: M. Perrier, Francujo 8.30 gld.; F-ino Jaggi de Araujo, Brazilo 7.69 gld.; Prof. C. Domingues,

Brazilo 38.46 gld.; G. Maertens, Belgujo 2.28 gld.; L. Minnaja, Italujo 50.— gld.; F-ino G. Simoni, Danlando 11.— gld.; K. Deubler, Germanujo 4.52 gld.; O. C. Lange, Danlando 11.— gld.; S-ino M. F. Onnen-Onnen, Nederlando 10.— gld.; Klubo "La Verda Kolombejo", Hispanujo 7.20 gld.; H. V. Rasmussen, Danlando 5.36 gld.; Ch. Thollet, Maroko 41.50 gld.; Norman R. Smith, Britujo 10.65 gld.; M. Lewin, Britujo 111.83 gld.; Fr. Höfart Aŭstrujo 5.31 gld.; M. L. Mc Namara, Novzelando 53.25 gld.; S-ino P. de Cleene, Novzelando 106.50 gld.; L. Jolliet, Germanujo 4.52 gld.; Klubo "Merkurio", Nederlando 25.72 gld.; D. M. Ponti, Nederlando 3.70 gld.; P. Zacho, Danlando 10.80 gld.; N. N. V., Nederlando 10.— gld. Entute 29 gld. Relegu la ĉefartikolon en ĉi numero de nia revuo kaj larĝe kontribuu por tiu ĉi unika celo!

#### DONACO AL ĜENERALA KASO

H. Amaral, Portugalujo 6.23 gld.  
D. O'Truessell, Usono 43.59 gld.  
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.  
M. H. VERMAAS,  
Direktorino C.O.

## ANONCETOJ

**Informoj urĝe bezonataj** por presata antologio! Kiu povas sciigi la plenan nomon kaj biografiajn detalojn de iu(j) el jenaj niaj verkistoj, tiu estas petata senprokraste informi la subskribinton. **Maria S. Tenner; Roman Frenkel; Czeslaw Kozlowski; Grindel Falkonbrig; Ludmila Jevsejeva; V. Sutkovo; M. Strumpfel; Brian Price-Heywood.** Koran antaŭdankon! **W. Auld, Knockfarril, Thornsidge Road, JOHNSTONE, Renfrewshire, Skotlando.**

**12-15 jaraĵ komencantoj** kaj ilia 31-jara instruisto deziras korespondi kun tuta mondo per pk. kaj leteroj. S-ro Lauri Häkli, Parikkala KK., Finnlando.

**Korespondanta Servo Mondskala.** Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne) Francujo, kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

**Por restarigo de esperantista lernejo** ni bezonas a) infanojn, b) domon, c) monon. Ni malsukcesis nur pro manko de infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice. Grupoj kaj fakasocioj, diskutu kaj skribu al S-ro Smith, Hove Farm, Brighton Road, Crawley, Sussex, Britujo.

**Per libervola laboro** L.I.C.S. starigos denove dum la somero, laborkampojn en multaj landoj. Informojn vi ricevos

de S.C.V.I., 77 boulevard Jean Jaures, Clichy (Seine), Francujo.

**Preta servo** por grekaj filatelajoj sub favoraj kondiĉoj. Petante informon aldonu respondkuponon. Alkis Georgandelis, Plomari (Lesbos), Grekujo.

**Pola geedziga oficejo "Swatka"** havas kiel celon (speciale por geesperantistoj) feliĉege helpi al soluloj kaj diskrete kunigi esperantistajn geedzojn. Ni havas kandidatojn/in el pli ol 10 landoj laŭdeziro. Skribu sekson, aĝon, intereson. Aldonu eble rpk al "Swatka", Łódź, Piotrkowska 133, Pollando.

**Nur france,** nur per ortograf 1958 korespondas C. Daglio, Litta Parodi (Alessandria) Italujo. Klarigoj kontraŭ r.kp. aŭ p.m. ne stampitaj aŭ p.k. kun pagita respondo.

**Esperanto parolata.** Adresaro de entreprenoj kiuj uzas Esperanton: hoteloj, restoracioj, magazenoj, informejoj, ktp. Tuj ĝin mendi al S-ro Rétot, 162 Boulevard Aristide Briand, Montreuil (Seine), Francujo: du respondkuponoj.

**Invitas senpage 2 esperantistojn** flue parolantajn nia grupo, dum unu semajno, komence de julio. Skribu al L. Lentaigne, 3 Av. de la Gaillarde, Montpellier, Francujo. Aldonu respondkuponon.

**Mezlerneja profesoro** Slobodan Petrović, VI. Jovanovića 5, Šabac, Jugoslavio, deziras korespondi kun kolegoj pri psikologiaj kaj filozofiaj temoj.

**Deziras korespondi** ĉiuj landoj, ĉiuj temoj. S-ro Roland W. Ruff, 730 Holley St., St. Albans, W.Va., Usono.

**Mielczarek Stanislaw, Brzózka 134a, p-ta: Blachowia, pow: Częstochowa** deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata.

**Deziras korespondi 25 gesamideanoj** komencantoj el Dugirat kun gejunuloj 15-30 jaraĝaj el la tuta mondo. Respondo garantiata. La adreso: Esperanto-kurso, Dugirat/inĝ. Ivo Vojnović, Dalmacija, Jugoslavio.

**1300 jara datreveno** de la benediktina abatejo okazos en Fécamp, Francujo la 5-an kaj la 6-an de julio 1958. Kun ĉeesto de multaj eksterlandaj aŭtoritatuloj. Grandegaj festoj okazos tiam. Skribu esperantlingve al: Benedictine, Fécamp, Seine-Maritime, Francujo, por peti la detalan programon.

**Danail Iv. Danailov, 5 Aprilov Gabrovsko, Bulgarujo,** deziras korespondi kun ĉiuj landoj per bildkartoj.

**Komencantoj en studrondo** serĉas korespondantojn. Adresu: Markhede, Rånkte, Svedlando.

**Inĝeniero** de la konstruado deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj pri diversaj ev. fakaj temoj. Volonta interŝanĝo de esp. revuoj, libroj kaj uzitaj poŝtm. Adreso: Mgr

Inĝ. Jakubiec Miñelo, Katowice, ul. Kasprzaka 31A/6, Pollando. Certa respondo.

**Surdmuta esperantisto** deziras ricevi leterojn de eksterlandanoj. Asparuh Veliĉkov Sumski, str. Kokiĉe 4, Sofia 21, Bulgarujo.

**Deziras korespondi** kun ĉi. kaj interŝanĝi il. gaz., librojn, toto, p.m. ktp. Vladimir Belajev, ul. Polejajeva 3/30 kv. 38, Nord Kaukaz, Groznij, Sovetunio.

**Por ekspozicia celo** bonvolu sendi ĉiajn esperantajojn al Stefan Záboj, Sidlište č 683, Banovce n/ Bebravov, Ĉeĥoslovakio. Ĉiu ricevos dankrespondon.

**Sofia Junulara Esperanto-Grupo,** Sofia, poŝtkesto 44, Bulgario, aranĝas en la fino de majo letervesperon. Skribu amase pri la vivo de la junularo tra la mondo. Ĉiuj ricevos respondon kaj laŭ deziro ni varbos gekorespondantojn.

**Dum septembro** ni aranĝos Esperanto-ekspozicion. Skribu multajn bildkartojn el ĉiuj mondpartoj. Respondo certa. Bartók Béla Kulturház, Sztálinváros, Hungara Popolrespubliko.

**E-glumarkoj** estas aĉeteblaj pri la Hungara Gimnazio en Germanujo ĉe: D-ro J. Kondor, Kastl b. Amberg, Pof. Germ. Kontraŭ 2 rpk.-oj 20 pecojn! Pli malgrandan mendon mi ne akceptas.

**48-jara esperantista instruisto** surdemuta, freŝanima, deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo. Respondo garantiata. Zivojin Jovanović, Nišavska 5, Niš, Jugoslavio.

**Urĝe bezonas kelkdekojn da** "ektuloj kaj tabletoj de la kuraĉlo" donvan St. 52-Asta malsana samideano Ivan H. Krestanov en Sofia, ser. 6 Septemvri, Bulgario, pagotajn per valoraj esp. libroj k. revuoj aŭ neuzitaj oficialaj esp. poŝtmarkoj bulgaraj, estante ankoraŭ malpermesate sendi monon eksterlandon.

**Serĉas eldoniston** por siaj tradukajoj kaj originalajb: Pacifistaj rakontoj, prozversajoj, felietonoj, teatraĵoj, romanoj, vojaĝnotoj impresoj esp. akd. Ivan Krestanov, ul. 6 septemvri 2, Sofia, Bulgarujo.

**S-ro Turowski Ludwik, u. Zamosc, ul. ul. Kalinowice 36, Pollando,** deziras korespondi k. ĉi. per il. pk. kaj leteroj.

**S-ro Turowski Ludwik, u. Zamosc, ul. Bazylianska 2/18, Pollando,** deziras korespondadi per il. pk. kaj leteroj.

**Aperis dua kajero** de Rondo Internacia de Esperantistoj-Tradukistoj. Sendu unu respondkuponon al: J.M.J. Driesen, Sam. Mullerstraat 7a, Rotterdam, Nederlando.

Antaŭ kelke da tagoj, kiam mi preferpasis unu el iliaj malliberejoj, mi ne povis ne halti por aŭskulti dialogon, kiu — mi kredas — eble iom amuzos vin. La konversacion faris ŝuldanto, kiu parolis tra la krado de sia karcero, portisto, kiu haltis por surferigi sian ŝarĝon, kaj soldato ĉe la fenestro. Temis pri minacanta invado el Francujo, kaj ĉiu el ili ŝajne deziregis savi sian landon antaŭ la minacanta danĝero. „Kiom koncernas min,” krias la malliberulo „mi pleje timas pri mia libereco; se la Francoj venkus, kio fariĝus pri la Angla libereco? Miaj karaj amikoj, la libereco estas prerogativo de la Anglo; tion ni devos konservi, eĉ se ni devos oferi niajn vivojn; je tio la Francoj neniam povos nin senigi; oni ne povus pensi, ke homoj, kiuj estas mem sklavoj, konservus al ni nian liberecon, se ili nin venkus.” „Ĝes, sklavoj ili ĉiuj ja estas!” krias la portisto, „ĉiuj indaj nur por porti ŝarĝojn. Antaŭ ol mi min mallevus ĝis la sklaveco, ĉi tio estu mia veneno (kaj li tenis la pokalon en la mano) — ĉi tio estu mia veneno, sed mi preferu soldatiĝus.”

La soldato, prenante la pokalon el la mano de sia amiko, tre solene kaj fervore elkriis: „Tia ŝanĝo endanĝerigus plie nian religion ol nian liberecon. Jes ja, nian religion, kamaradoj. Ke la Diablo sin mergu en la flamojn (tiel solena estis lia ĵuro), sed se la Francoj alvenus nia religio estus tute ruinigita.” Tion ĉi dirinte, li metis al siaj lipoj la pokalon, anstataŭ oferverŝo, kaj konfirmis siajn sentojn per ceremonio plej persiste sindonema.

„LA MONDA CIVITANO” de Oliver Goldsmith

## EL LA ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Prezo: 10 ned. gld. (40 steloj)

Mendu tuj de U.E.A.

## AĈETU DORMSAKOJN, same KOVRILOJN, se vi tendumos.

Petu prezliston kaj kondiĉojn.

Skribu al TUTMONDA SPORT, HENGELO (O)  
NEDERLANDO — Langelermatweg 217

## Ĉe- instruistoj!

Danujo bezonas vin. Skribu al mi pri viaj kvalifikoj. Se vi jam pasintjare skribis, estu afabla kaj renovigu, por ke mi havu la ĝustan adreson.

Centra Dana Esperantista Ligo.  
Leo Søgaard-Hansen  
Uffesvej 17  
Aarhus — Danujo.

## INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ

Esperanto kaj Geonismo

KASTELO MÜNCHENWILER  
apud MURTEN-MORAT, Svislando

10—17 aŭgusto 1958

Dir: D-ro William Perrenoud, Prof.  
Prospekto kaj informoj ĉe:  
Svisa Esperanto-Instituto  
Breitenrainstrasse 12, BERN

Reaperos antaŭ U.K.-MAINZ

## Retoriko

de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo, je antaŭmendo (ĝis 1-8 '58

Tole bindita: 9 gld. (36 steloj)  
Broŝurita: 7,50 gld. (30 steloj)

Mendu tuj ĉe UEA  
aŭ ĉe la aŭtoro

## la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de  
Prof. G. Waringhien  
kun kunlaborado de  
la plej famaj verkistoj  
aperas ĉiun duan monaton  
32/40 paĝa - - poŝformato  
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:  
En Francujo: R. Fiquet, Poŝta  
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Cefdelegitoj kaj  
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:  
7. Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad  
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)

Francujo.

## BELARTO

APERINTA !!

Belega kajero, unika en  
la Esperanto-literaturo.

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

Prezo: por membroj  
2.75 gld. 11 st.,  
por nemembroj 3.25 gld. 13 st.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam